

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

UEA

80-jara



TRADICIA
KUNLABORO
INTER
BALKANAJ
ESPERANTISTOJ



BET
JUBILEAS



PRI LA E-
PROPAGANDO



LA METODO
DE ANDREO
CSEH



100 TAGOJN
EN BULGARIO



JARO 57 • N-RO 6 • JUNIO • 88

KIE NI ESTAS?

KONSTATOJ LIGE KUN LA SOCIETAJ JARKUNVENOJ

Ĉi-jare la jarkunvenoj de la societoj de Bulgara Esperantista Asocio okazis pli malfrue ol ordinare, post la Plenkunsido de CE de BEA (16.1.1988), kiam komenciĝis la renovigo enkadre de BEA.

Gis nun estis loĝlokoj (precipe la grandaj urboj), en kiuj funkciis pli ol unu societo. Laŭ la nova strukturo de BEA tiuj societoj unuiĝis en unu sola esperantista societo en la koncerna loĝloko aŭ komunumo. Nur en Sofio restis pli da societoj, organizitaj laŭ la teritoria strukturo de la ĉefurbo.

Por helpi la organizadon de la kunvenoj la membroj de la Centra Estraro de BEA estis komisiitaj viziti lokajn societojn. Antaŭ la kunvenoj ili renkontiĝis kun reprezentantoj de la lokaj ŝtataj kaj publikaj organizaĵoj kaj informis ilin pri la renovigo en BEA. Do, ne eblas fari ĝeneralan pritakson pri la okazintaj kunvenoj, ĉar pro ilia multnombreco ni ne sukcesis viziti kaj helpi ĉiujn. Estis bone kaj malpli bone organizitaj kunvenoj. Surbaze de propraj impresoj kaj de informoj ricevita de kolegoj la rezultoj de la kunvenoj estas pozitivaj. La plimulto de la esperantistoj plene subtenis la decidojn de la Plenkunsido de CE de BEA. Dum la kunvenoj oni konstatis la nunan staton (organizan, kulturen, ktp) de la societoj. La societanoj sincere, zorgoplene kaj kritike parolis pri la mankoj kaj la eraroj en sia laboro kaj same pri la vojoj kaj rimedoj por plibonigi la laboron. La faktoj montris, ke parto de la societaj estraroj ne kapablas sukcese gvidi la societojn, organizi interesajn, emociajn kaj utilajn Esperanto-aranĝojn. Do pro tiaj kialoj multaj estraranoj ne estis reelektitaj. En iuj el la eldiroj dum la kunvenoj oni substrekis, ke la lingvo-konoj de granda parto de la esperantistaro ne estas sur la necesa nivelo. Ne-kontentiga estas la kunlaborado kun diversaj amasaj organizaĵoj en la lando kaj kun Esperanto-organizaĵoj eksterlande.

Sendepende de la menciitaj mankoj, dum la pasinta jaro la esperantistaj societoj organizis multajn aranĝojn kaj samtempe partopre-

nis aliajn dediĉitajn al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj al la 80-jariĝo de BEA.

Bone organizitaj estis la jarkunvenoj de la Esperanto-societoj en Veliko Târnovo, Ruse, Vraca, Burgas, Sliven k. a. Ne estis kontentiga la laboro de la kunvenoj en Varna, Stara Zagora, Miĥajlovgrad k. a., en kiuj ne partoprenis ĉiuj societanoj, mankis bona ordo, ne ĉeestis reprezentantoj de aliaj amasaj publikaj organizaĵoj. Nun mi nur mencias pri la Esperanto-societoj en Sofio, ĉar la kunvenoj en la ĉefurbo ĵus komenciĝis.

La kunvenoj montris al ni, ke la renovigo estas malfacila kaj longedaŭra proceso. Gis nun laŭ la malnova strukturo de BEA la distriktaj estraroj organizis la agadon kaj samtempe ne donis eblecon al la societoj memstare, aktive kaj iniciateme labori surloke. Gis nun ni celis „fabriki“ multajn esperantistojn, sed mankas kvalito. Nun, kiam la plenkunsidaj decidoj skizis la vojon, ni devas, pere de diversaj rimedoj kaj formoj, konforme al la lokaj specifaj kondiĉoj, senĉese perfektigi la multifacetan esperantan agadon. Nature, la sukceso dependas de la saĝo, laborkapablo kaj aktiveco de la tuta esperantistaro kaj plejparte de la gvidkadruloj kaj instruantoj de Esperanto. Por ke nia laboro plensukcesu, estas nepre necese plibonigi la organizan staton de la societoj kaj la instruadon de Esperanto, zorgi pri ĝia aplikado. Nepre necese estas plibonigi nian kunlaboron kun la enlandaj junularaj organizaĵoj. Memkompreneble, oni devos pliriĉigi la kunlaboron kun eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. Pli efika devas fariĝi la altiro kaj varbado de novaj (precipe junaj) membroj.

Evidente, ĉe ni ekzistas multe da problemoj kaj malfacilaĵoj. Estas bone, ke CE de BEA vidas kaj reale pritaksas ilin. Ni esperas kaj forte kredas, ke la multnombra bulgara esperantistaro plensukcesos en sia nobla laboro.

Radoslav PARAŠKEVOV,
sekretario de la Organiza
Komisiono ĉe BEA



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 57

JUNIO

6 • 1988

UEA 80-jara

Nikola ALEKSIEV,
honora membro de UEA

Komplika kaj sufiĉe dornohava estis la vojo al fondo de Universala Esperanto-Asocio. En konciza artikolo kompreneble estas malfacile eĉ nur indiki la plej ĉefajn momentojn. Estas ebla nur magra skizo tiurilate.

Inter la rekonataj gvidantoj de la internacia E-movado, ankoraŭ tre juna kaj malforta, estis personoj kun tute malsamaj, eĉ kontraŭaj vidpunktoj pri la problemoj de internacia E-centro kiel organiza kaj propaganda apogo de ĉiuj aspektoj de la Movado. Iuj, kvankam nebule, insistis pri tio, aliaj decide kontraŭstaris. Iuj insistis, ke la E-movado havu nur pragmatisman pozicion, dum Zamenhof kaj liaj samideanoj eĉ ne pensis la Movadon sen humanismaj idealoj.

Pasis du jardekoj depost la apero de Esperanto en akra interbatalo. Feliĉe la juna svisa esperantisto Hektor Hodler trovis taŭgan kombinon inter humanisma ideologio kaj pragmatismo en la E-movado. Sur simila bazo li fondis Universalan Esperanto-Asocion en 1908, kun sidejo en Genevo.

Tamen ekestis la Unua Mondmilito, kiu malakordigis la tiaman internacian E-movadon en malamikajn tendencojn. La ankoraŭ beba UEA trovis kuraĝon ne likvidiĝi, sed ĝi devis agi sur treege malvasta tereno, tute specife: UEA peris kontaktojn inter militkaplitoj el la teritorio de neŭtrala Svislando, simile al la Internacia Ruĝa Kruco. Sendube, tio estis nobla agado.

Tuj post la militfino Hodler klopodis starigi UEA surpiede, plivastigi ĝian agadsferon. Sed li forpasis tre juna en 1920. La estraranoj de UEA ŝanĝiĝis, sekvis jen altiĝo, jen malaltiĝo de la membronombro. UEA falis en krizon, kiu pliprofundigis post la venko de reakciaj faŝistaj reĝimoj en vico da eŭropaj landoj. Rezulte de

tio, en la antaŭvespero de la Dua Mondmilito, UEA displitiĝis. Oni formis Internacian Esperanto-Ligon (IEL) kun sidejo en Britlando. UEA, malfortigita, ekzistis preskaŭ simbole en Genevo. Tiu organiza dueco estis tre malutila al la internacia E-movado, tamen ĝi daŭris dek jarojn (1936—1946).

Nur en 1946 ebligis la kunfluiĝo de ambaŭ rivalaj organizaĵoj. UEA kaj IEL unuiĝis sub la firmao de UEA kun sidejo en Genevo. Tiu evento estis pozitiva, sed tiutempe pliakriĝis la „malvarma milito“ inter Okcidento kaj Oriento. La organiza krizo de UEA estis superita, sed pliakriĝis la ideologia krizo sub la influo de la „malvarma milito“. Iuj okupis la pozicion de reakcie interpretata neŭtraleco, aliflanke la progresema esperantistaro okupis sek-taneccan pozicion. UEA daŭre restis en febra stato.

Feliĉe, ambaŭ flankoj trovis manieron por komuna laboro, sub la standardo de UEA, malgraŭ la granda diferenco en ties partipolitikaj tendencoj. Plistabiliĝis ankaŭ la organiza bazo de la internacia E-movado. La universala kongresoj estis regule kunvokataj, pliriĉiĝis ties programo. UEA proksimiĝis al Unuiĝintaj Nacioj kaj al ties specialaj organoj kaj organizaĵoj, precipe al Unesko. Unesko aprobis gravajn rezoluciojn (1954, 1985) favore al Esperanto kaj al ties reprezentanto — UEA. Iom post iom kreiĝis kondiĉoj permesantaj al UEA eliri el izoliteco kaj malfermiĝi ankaŭ al la ekstera, neesperantista mondo. En sufiĉe alta grado estis malaprobata la malnova koncepto pri strikta, senfrukta, sterila neŭtraleco. UEA adaptiĝis, ne sen interna batalo, al la nova moderna epoko kaj trovis vojon al kunlaboro kun aliaj neesperantistaj organizaĵoj kaj

movadoj, kies celoj estis: mondo senmilita, mondo demokrate funkcia, defendanta la bazajn homajn rajtojn, kontraŭanta la rasismon, la rasan apartenecon, la ŝovinismon;

Sendube, tio plialtigis la aŭtoritaton de UEA en la medioj de la neesperantista mondo kaj kreis kondiĉojn por fruktodona kunlaborado en la nomo de prioritataj celoj — konservo de la monda paco, evitigo de monda milito kiel solvo de kontraŭdiroj kaj disputproblemoj de diverstendencaj blokoj, por suvereneco kaj egaleco de ĉiuj nacioj, por interkompreniĝo kaj sekureco de ĉiuj ŝtatoj sendepende de ties interna sociordo.

Tiu vojo estas la unusola, kiu povus helpi por evito de tuthomara nuklearmila pere. Tiu vojo respondas al la sincera memsento de la esperantistaro, manifestinta ĝin dum la universa-

laj kongresoj, saturitaj per spirito de kunlaborado de diverstendencaj esperantistoj en la nomo de komuna humana celo.

Laŭ tiu vojo UEA farigas esprimanto de la plej humanaj trajtoj de la internacia E-movado kaj gajnas pli kaj pli da simpatioj inter la vastaj rondoj de neesperantistaj movadoj kaj organizaĵoj.

Ni bondeziru al moderna UEA novajn sukcesojn!

Ni laboru, ke la Centjarigo de UEA estu celebrata en mondo sennuklea, civilizita, sub ĉielo serena!

Car nur la venko de la homa progreso en monda skalo kronos per neviditaj ĝis nun sukcesoj la agadon de la monda esperantistaro.

Roman Malinowski al „Bulgara Esperantisto“



MARSZAŁEK SEJMU
POLSKIEJ RZECZYPOSPOLITEJ LUDOWEJ

Warszawa, dnia 15 grudnia 1987 r.

Redakcio de BULGARA ESPERANTISTO
Sofio

Finigas la solenado de la Jarcento de la Internacia Lingvo Esperanto en Pollando kaj en la mondo. La apogeo de la celebrado de ĉi tiu datreveno estis la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, kiun akompanis aliaj kongresoj, konferencoj kaj fakaj renkontiĝoj en diversaj urboj de Pollando, i. a. en Bialistoko, la naskiĝurbo de la Kreinto de Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

Multaj miloj da partoprenintoj omaĝis nian Grandan Samlandanon, kies verko praktike servas al la realigo de la interkompreniĝo inter la multnombraj amikoj de nia Patrio kaj kontribuis al la profundigo de la sentoj de simpatio kaj amikeco al nia popolo.

Mi esprimas al Vi mian tutkoran dankon kaj mian altan rekonon pro la eminenta kontribuo al la realigo de la jubilea programo.

ROMAN MALINOWSKI

La Alta Protektanto
de la 72a Universala Kongreso

UNUA PROVO PRI KUNLABORO INTER BALKANLANDAJ ESPERANTISTOJ

80 jaroj de la II Kongreso de BEA



Antaŭ 80 jaroj, dum la II Kongreso de BEA en Ŝumen (13-15.7.1908) la bulgaraj esperantistoj fariĝis unuaj iniciatintoj por interkompreniĝo kaj kunlaborado inter la popoloj de la Balkana Duoninsulo, pere de dua helpa lingvo, post la gepatra.

En la arkivoj de „Vekiĝo” (Ŝumen) — unu el la unuaj E-societoj en la lando, estas konservataj valoraj informoj pri la II Kongreso de BEA (tiutempe — BEL, t.e. Bulgara E-ligo). Jen kiel Ksenofon Jankov — tiama sekretario de la societo kaj de BEA, kaj Kiril Bogutinski — historiisto de la societo, priskribas en siaj rememoroj kaj en revuo „Lumo” (n-roj 3, 4 kaj 7/1908), tiun grandan eventon:

„Post la decido de la Gvida Konsilantaro de la Asocio pri okazigo de la II Kongreso en Ŝumen, grupo „Vekiĝo”, ĝustatempe, en kelkaj siaj kunvenoj, pridiskutis la antaŭstarantajn taskojn. Ĉiam ankoraŭ malmultnombra, ĝi sin apogas sur la laborkapablo kaj energio de siaj fidelaj membroj. Ĝi ĉiam ankoraŭ devas batali kun la fortoj de la mallumo, kun multaj antaŭjuĝoj, por ke vivu la ideo pri internacia lingvo. Kiel preleganton la grupo invitas s-roon Hristo Popov — la unua bulgara propagandanto de Esperanto. Li venas en la dua Pasko-tago, per la rapida trajno. Por la okazo estas presitaj, disgluitaj kaj dissenditaj afiŝoj, kaj la estraro de legosocieto „Arĥangel Mihail” (nun „Dobri Vojnikov”) bonvole kaj senpage disponigas sian salondon. Ĉiuj senpacience atendas la alvenon de la trajno el Gorna Orjahovica, interparolante en kaj pri Esperanto. La kara gasto alvenas, per plej ĝojaj sentoj oni bonvenigas lin kaj ekiras tra la urba ĝardeno al la urbo. La prelego pasas brile, ĉe plena salono. Tiutempe estas elektita kongresa orga-

niza komisiono. Oni proponas, ke la kongreso okazu la 2-an de majo 1908 — la festo de „Vekiĝo”, estas decidite eldoni esperantan kantlibron, en la loka gazeto „Obŝtinski glas” („Komunuma Voĉo”) kaj en gazeto „Narodna volja” („Popola Volo”) estas publikigitaj artikoloj pri la prelego de Hristo Popov kaj pri la sukcesoj de Esperanto. Estas organizita tombolo kun 2000 biletoj po 30 stotinkoj, el ili 105 gajnoj. Estas presitaj 1000 propagandaj broŝuroj. Estas organizitaj kursoj: ĉe legosocieto „Napredak” („Progreso”) kun lektoro la helpkuracisto Kamilarov, ĉe la klubo de la metiista unuiĝo, gvidata de Ilija Todorov, ĉe societo „Vekiĝo” kun lektoro la societa prezidanto Ilija Silvestriev kaj ĉe la armena legosocieto. Sed plej grava estas la prenitaj tiam decido — por unua fojo al la kongreso estu invitataj gastoj-esperantistoj el la najbaraj balkanlandoj: Greklando, Jugoslavio, Rumanio. La deziro kaj la celo de ĉiuj estas, ke la komuna lingvo helpu venki la konstantajn kverelojn kaj kunpuŝigojn inter tiuj landoj, por starigo de interkompreniĝo sur la Balkana Duoninsulo. Al la invito por partopreno plej afable respondas la nordaj najbaroj — la rumana esperantistoj.

Pro la mallonga tempo por organizo de la kongreso kaj pro diversaj malfacilaĵoj, la sama estas prokrastita por la 13-a, 14-a kaj 15-a de julio de la sama jaro. Jam la 12-an de julio la tuta urbo Ŝumen viglas. La ŝumenaj esperantistoj laboras — iuj kun plumo enmane en la akceptejoj, aliaj ornamas la urbon kun esperantaj flagoj, triaj provludas por la antaŭstaranta koncerto, denove aliaj preparas la ekspozicion. Unu post alia alvenas la kongresanoj. Ĉiu estas elkore bonvenigata de la organiza komisiono kaj tuj loĝigata. Alvenas ankaŭ la membroj de la Gvida Konsilantaro. La fervoja stacidomo estas plenplena de gastigantoj, sur ĉies brustoj estas verdaj rubandoj kun blanka surskribo „BEA — Ŝumen 1908”. Flirtas esperantaj flagoj. Oni senpacience atendas la vagonaron kun la karaj rumanaĵoj. Renkontiĝo vere kora kaj varma! En 12.05 horo la trajno alvenas. Sur la kajo estas la prezidanto de BEA Hr. Haralambiev, la redaktoro de „Lumo” M. Georgiev, Hristo Popov, Ilija Silvestriev. Ĉiuj parolas esperante. Salutante la rumanaĵojn esperantistojn per „Bonvenon sur bulgara tero”, Hr. Haralambiev memorigas la tempon, kiam niaj revoluciuloj Levski kaj Botev trovis rifuĝejon en la patrolando de la karaj gastoj, dum la batalo kontraŭ la 5-jarcenta sklaviganto. Poste li diras: „Dum sia 30-jara libera vivo la bulgara popolo eĉ por momento ne ĉesis interesiĝi pri la evoluo de siaj najbaroj. La aperinta de la nordo verda stelo ne povas ne altiri ambau popolojn al komuna laboro por tuthomara kulturo kaj amikeco.” En la nomo de la 11-membra rumana delegitaro respondas d-ro Robin — prezidanto de la Rumana Esperanto-Societo.

Neforgeseblaj estas tiuj tri gloraj tagoj — 13-a, 14-a kaj 15-a de julio (malnovstilo), tiuj tri solenaj festoj de la esperantismo en juna Bulgario. La bulgaraj kaj rumanaĵoj esperantistoj alte manifestas la noblan ideon pri frateco kaj paco.

La 13-an de julio, je la 10 horo, la teatra salono de legosocieto „Arĥangel Mihail” estas plenplena de delegitoj, gastoj kaj publiko. Ĉe la enirejo kaj en la skvaro ilirtas bulgaraj, rumanaĵoj kaj esperantaj flagoj. Ilija Silvestriev malfermas la kongreson, multfoje interrom-

pata de fortaj aplaŭdoj. Post li parolas d-ro Robin, Jon Gugla — sekretario de la rumana E-societo, la blinda bukureŝta esperantisto Levi. Per paroladoj kaj eldiroj en la unua kongrestago partoprenas: Mladen Georgiev — redaktoro de „Lumo“. Hristo Popov — prezidanto de la Kontrolo Konsilantaro, Gaŝevski — instruisto el Bjala Slatina. Tagmeze de la sama tago estas malfermita esperanta ekspozicio, la delegitoj sin fotografas antaŭ la kongresejo. Unuanime estas akceptita kaj sendita saluttelegramo al d-ro Zamenhof. Post la fermo de la posttagmeza kunsido en la restoracio en la bela arbara loko „Kjoŝkovete“ okazas bankedo kaj pli malfrue, vespere — teatra kaj literatura-muzika spektaklo, kun la partopreno de bulgaraj kaj rumanaĵ esperantistoj. La sekvan kongrestagon faras paroladon la prezidanto de BEA H. Haralambiev. Poste estas elektita nova Gvida Konsilantaro en konsisto: Prezidanto — Ilija Silvestriev (Sumen), sekretario — Ksenofon Jankov (Sumen), ĉefredaktoro — H. Haralambiev, redaktoroj — Hr. Popov kaj Ivan Nenkov. Dum la sekva jaro Haralambiev estas liberigita de tiu posteno. En la Kontrolo Komisiono estas elektitaj:

Ivan Terekiev, A. Ivanov kaj Gaŝevski. Mandolina kaj gitara orkestro kaj virina ĥoro plenumas la esperantan himnon, la marŝon de „Vekiĝo“ kaj kelkajn rusajn kantojn. La 15-an de julio matene okazas la lasta kongresa kunsido. Entuziasme estas akceptita Rezolucio aprobanta la kongresan laboron kaj Decido pri translokigo de la sidejo de BEL kaj de la redakcio de „Lumo“ el Veliko Tŝrnovo en Sumen. Estas esprimitaj laŭdo kaj danko al la urba estraro pro la manifestita gastamo. Al la rumanaĵ esperantistoj estas esprimita kora danko pro ilia unua gastado en Bulgario, kontribuanta por la bonnajbaraj rilatoj inter la du popoloj.“

La ekzemplo de la unuaj agantoj, de antaŭ 80 jaroj por Balkana kunlaborado pere de Esperanto estas viva ankaŭ hodiaŭ. Por la sama nobla ideo laboras ankaŭ la nuna generacio de bulgaraj esperantistoj.

Cvjatko TODOROV

KVALIFIKA PORINSTRUISTA KURSO — ESPEROJ KAJ KONKLUDOJ

De la 31-a de marto ĝis la 9-a de aprilo 1988 en Sofio okazis kvalifika kurso por instruistoj de Esperanto, organizita de la Centra Instituto por Kvalifikado de Instruistoj (CIURK) kunlabore kun la Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado (KISA) ĉe BEA.

Post unujara paŭzo denove ekfunkciis la kursoj ĉe CIURK, tamen kun nova enhavo. Tio jam estas kursoj por plialtigo de metodikaj kaj lingvaj konoj de niaj instruistoj, kiuj finis triagradan aŭ instrurajtigantan kurson de Esperanto kaj kiuj bezonas refreŝigon de siaj metodikaj kaj lingvaj konoj.

Dum la kurso 18 E-instruistoj el la lando aŭskultis prelegojn pri diversaj metodikaj kaj lingvaj demandoj, prezentitaj el teoria kaj praktika vidpunktoj. Alte kvalifikitaj lektoroj el CIURK, el la Sofia Universitato kaj BEA tuŝis en siaj prelegoj ege necesan kaj utilan por la kursanoj materialon. „Tuŝis“,

ĉar la tempo estis nesufiĉa, kvankam multaj kursanoj plendis pro la streĉa laboro. Ofte, post la studhoroj aperis multaj demandoj montrantaj la vigan intereson al la prelego. Sed, laŭ opinio de aŭskultantoj pri la kurso, kiun ili bonvolis doni en skriba formo, estas substrekitaj la neceso de pliaj praktikaj ekzercoj, de bibliografio pri la aŭskultitaj temoj, de stilistikaj ekzercoj k. a. Apartan kontenton montris la kursanoj en siaj eldiroj pri la prelegoj de Kremona Bâceva, Ivanka Spasova — el Sofio, Rumjana Janeva el Gabrovo, Violin Oljanov kaj ankaŭ de Valentin Colov — docento, direktoro de la Instituto pri Stenografio en Sofio. Do, KISA faris jam konkludojn pri la temoj kaj ilia graveco, pri la nivelo de la prelegoj mem kaj pri kelkaj organizaj momentoj. Sed estas neeble labori trankvile kaj sen streĉigo dum nur dek tagoj kaj samtempe ekscii multon novan, refreŝigi forgesitajn konojn kaj samtempe praktiki la lingvon.

Aliflanke antaŭ KISA, respektive antaŭ BEA aperas la

jena problemoj. CIURK organizas kursojn nur por profesiaj instruistoj. Tamen, kvalifikadon bezonas ankaŭ niaj E-instruantoj, kiuj ne estas profesiaj instruistoj, kiuj neniam okupiĝis pri metodiko de fremdlingva instruado. Mi intence ne mencias tiujn 20—30 horojn en la Instrurajtiga kurso, kiuj por multaj estas eble delonge forgesita okazaĵo. Ni ne parolu pri tio, ke nur malmultaj el ili kutimas foliumi metodikajn ĵurnalojn, verŝajne ankaŭ pro tio ke tiuj estas malfacile troveblaj, eĉ en bulgara lingvo. Klare estas, ke tiuj el ili, kiuj estas bonaj instruistoj, estas bonaj ne dank' al niaj zorgoj, sed kontraŭe — malgraŭ niaj malzorgoj, nur dank' al siaj kapabloj kaj laboro. Certe ni multon ŝuldas al niaj neprofesiaj instruantoj, kiuj estas la duono de ni, se ne pli. Evidente, organizo de kvalifikaj kursoj por neprofesiaj E-instruantoj kun studhoroj pri teorio kaj praktiko de la lingvo estas problemoj, urĝe solvendaj.

Libertaria MLADENOVA

DENOVE PRI LA ASIMILADO DE PROPRAJ NOMOJ

Nia leganto Petko Najdenov el Trjavna skribis al Violin Oljanov, membro de la Akademio de Esperanto, petante lin klarigi la ankoraŭ ne definitive deciditan demandon pri transskribado de nomoj de homoj kaj geografiaj nomoj:

„Ofte en „BE“ oni tradukas la nomojn de eminentaj sciencistoj: ekz. Karlo Markso, Darvino, V. I. Lenino. En diversaj korespondadoj de la sama gazeto oni esperantigas bulgarajn nomojn: Dimitro, Petro ktp., aŭ nomojn de urboj: Varso, Plovidivo, Ruso k. a. Sajnas, ankaŭ eksterlande oni kutimas esperantigi urbonomojn (Augsburgo).

Multaj esperantistoj indignas kontraŭ tia esperantigo, kaj la malamiko de la lingvo primokas nin. En neniu nacia lingvo oni aŭdacas „traduki“ la proprajn nomojn. Marx, Darwin, Lenin, Dimitrov en ĉiuj lingvoj estas skribataj egale kiel estas konataj.“

Ĉi-sube la redakcio publikigas la respondon de Violin Oljanov:

La disputo pri la skribado de la propraj nomoj estas malnova kaj verŝajne daŭros ankoraŭ longan tempon. Forta estas la partio, kiu opinias, ke Esperanto devas asimili ilin, t. e. skribi ilin laŭ la ortografio de la internacia lingvo. Ofte estas uzataj: Ŝekspiro, Voltero, Dikensio, Ŝulco. . . Kiel mi komprenas, provokas vian malkontenton nur la finaĵo o. Sed ni facile povas liberigi de ĝi: Ŝekspir, Didro, Ŝiler, Bodler, Rejgan, Peteŝ, Serdahej ktp. En tiu ĉi okazo la problemo estas, ke ne ĉiuj sonoj estas esprimblaj per Esperantaj literoj. En la naciaj lingvoj estas centoj da fonemoj (sonoj uzataj en lingvo, kies ŝanĝo povas ŝanĝi la sencojn). Sed Esperanto havas nur 28 literojn. Evidente ni ne povas esprimi ĉiujn ĉi fonemojn per la ekzistantaj Esperantaj literoj. Ni penas alproksimiĝi al la ĝusta prononco, sed en la granda plimulto da okazoj ĝi estas nur proksimume ĝusta. En multaj okazoj ni tiel malproksimiĝas de la origina prononco, ke povas rezulto embaraso kaj miskompreno.

Ĉe fonetika prezento de nomo oni estas forte influita de sia nacia transskribo, precipe se ĝi okazas en la kirila alfabeto. Bulgaraj esperantistoj ekzemple skribus la nomon de la germana poeto Goethe tiel: Gĵote. Tamen ĉiuj ceteraj skribus: Gete. Bulgaroj skribus la nomon de la granda franca verkisto Hugo — Jugo, tamen la francoj asertas, ke la plej proksima transskribo estus Igo, kaj rusaj kaj aliaj sovetiaj esperantistoj povus skribi Gĵugo (!) Montesquieu bulgaroj transskribus Montesĵko, tamen francoj — Monteskje. Ekzemplojn de malregula transskribado oni povus doni multajn. Ĝi dependas de la tradicioj en la koncerna lando.

Tradicio en lingvo ludas grandan rolon. Eĉ en okazoj, kiam iu nomo estas facile transskribebla, la na-

cianoj de la lando, el kie devenas la nomo malfacile perceptas la fonetikan formon, precipe se ĝi konsiderinde diferencas de la origina. La vicprezidanto de MEM William Gilbert foje diris al mi, ke se li renkontus la nomon Viliam (aŭ Ujliam) Ĵilber, li ne komprenus, ke ĝi rilatas al li mem. En tiaj okazoj plej bone estus prezenti familian nomon laŭ la origina nacia ortografio kaj en krampoj montri la proksimume ĝustan prononcon, se tio estas farebla per la 28 Esperantaj literoj.

Ĉe la propraj nomoj pli ofte estas renkontebla asimilado: Georgo, Petro, Ivano, Samuele, Rikardo, ktp. Ne estas vera la aserto, ke la nomoj en diversaj lingvoj ne ŝanĝiĝas. Ekzemple la bulgara nomo Petăr (eĉ ni ne povas ĝin transskribi per la esperantaj literoj). En aliaj lingvoj ĝi akceptas jenajn formojn: Pierre (Pier), Pieter (Piĉer aŭ Piĉăr), Pjotr. . .

Georgi: Georges (Jorĵ, Ĝo(r)ĝ, Georgij. . .

Miĥail: Michel (Miŝel), Miĥaly (Mihaj), Mickael (Majkl). . .

Prezentiĝas demando: kiel laŭ via starpunkto oni devas prezenti en belarta literaturo la nomon Petro: ĉu kiel la franca Pierre, kiel la germana Pieter, kiel la rusa Pjotr, aŭ kiel la bulgara Petăr? Evidente, en tiuj okazoj plej konvena estas la esperanta formo.

Kiel staras la demando pri la geografiaj nomoj? Tie ankaŭ estas granda varieteco en diversaj lingvoj:

Dunav, Dunaj, Donau, Danubo. . .

Cerno more, Ĉornoe more, la mer Noire, Schwarzes Meer. . .

En Esperanto ni asimilas la nomojn de la oceanoj, la maroj, riveroj, grandaj montaroj, insuletoj, urbegoj, precipe ĉefurboj: Pacifiko, Mediteraneo, Nigra Maro, Danubo, Dnepro, Volgo, Rejno, Alpoj, Himalajo, Balkanmontaro, Ĉeĵono, Grenlando, Kipro, Parizo, Moskvo, Sofio, Berlino, Stokholmo.

Malgrandaj kaj nekonataj geografiaj objektoj restas kun siaj naciaj nomoj: Sredna Gora, Golo bardo, Iskâr, Veliko Târnovo, Marica, Kazanlâk k. a.

Kiel videblas, la demando pri transskribo de propraj nomoj estas tre komplika kaj malfacile oni povus fari striktajn regulojn. Ni povas transskribi fonetike nomojn facile adapteblajn al tio, sen danĝero pri miskompreno. Ni ne devas transskribi fonetike ekzemple la nomon de la eminenta franca verkisto Rousseau (Ruso), ĉar oni povus miskompreni ĝin kiel anon de la rusa nacio. Oni devas atenti ankaŭ, ke la transskribado Esperanta ne influigu de la nacia. En ĉiuj ceteraj okazoj ni devas skribi la nomojn laŭ la origina ortografio, laŭeble montrante en krampoj la prononcon.

Kaj tamen la demando dume estas lasata al individua prefero. Reguloj ne ekzistas, kaj certe baldaŭ ne estos.

Violin OLJANOV

BET JUBILEAS

Ĉi-jare Bulgara Esperanto-teatro festas la 30-jaran datrevenon de sia krea agado.

Dum tiu periodo la aktora kaj reĝisora konsisto de BET ŝanĝiĝis, tamen la celo restis la sama: per Esperanto realigi scenejan arton, dediĉitan al bulgaraj kaj alinaciaj esperantistoj. La repertuaro inkluzivas klasikajn kaj nuntempajn dramistojn, unuaktajn kaj kelkaktajn teatraĵojn. Ĉu duope, ĉu grupe BET gastas al esperantistaj festoj, festivaloj, celebradoj en la tuta lando. La gazetaro reeĥas pri ĝiaj sukcesoj sur nacia kaj internacia scenejo. Plej grandaj forumoj proponis sian podion por la spektakloj de BET: oknaciaj kongresoj de BEA, dek ok universalaj kongresoj de UEA, kvar — de IFEF, du — de TEJO, esperantistaj renkontiĝoj k. a.

BET prezentis al la esperantista mondo dramojn de Ivan Vazov, J. Jovkov, St. L. Kostov, rakontojn de Elin Pelin, A. Karaliĉev, poezion de klasikaj kaj nuntempaj poetoj.

Ĉi-sube legu fragmentojn el la libro de Belka Beleva „Teatro sen lingva bariero“, kiuj rememorigas pri la unuaj paŝoj de BET.



Parto de la nuna konsisto de BET (de maldekstre):

Nikolaj Klisurov, Nikolaj Ivanov, Luna Davidova, Belka Beleva, Nikolaj Uzunov — direktoro de BET, Gertruda Lukanova — artgvidanto kaj reĝisoro de BET, Veneta Zjumbjuleva, Kunĉo Válev — lingva konsultato, Ivan Zlatarev.

La komenco

Ĝi datigas de la teatra sezono 1957—1958. La loko estis la tiama dramteatro „Trudov Front“ (Labora Fronto). Ekde la momento, kiam aperis anonco pri Esperanto-kurso. En nia familio Esperanto estis konata: panjo ellernis ĝin ĉirkaŭ la 20-aj jaroj, kiel lernantino. Anani — kiel lernanto en urbo Radomir kun instruisto Marin Jordanov. Konatiĝi kun la nova lingvo estis por mi preskaŭ devige. Al la iniciatinto de la kurso — nia kolego, la malnova esperantisto Georgi Kerelezov kaj al la instruanto —

la ĵurnalisto kaj fervora esperantisto Mihail Langov — koran dankon!

Gekursanoj estigis grupo da kolegoj el la sama teatro kaj Anani, kiu tiutempe aktoris en alia.

Kaj nur post du-tri monatoj naskiĝis ideo, aŭ neceso, antaŭ publiko ekparoli en Esperanto.

Sur la unua foto, kiu senmortigas tiun ĉi nian agadon, montriĝas mi en furioza pozo: ĉu pro la plenumo de la agrable humura hinda legendo pri la kreo de la virino, ĉu pro la streĉo senerare ekparoli la novan por mi lingvon. La plenumo estis okaze de la Internacia Tago de Virino en la tiama E-kлубo sur strato „Rakovski“.

Ni, geaktoroj, fariĝis membro de Bulgara Esperantista Asocio — aparta grupo ĉe la Urba E-Societo „Maksim Gorkij“. Kune kun la progreso en lernado de la lingvo kreskis nia emo lerni artajn verkojn.

Kaj jen, naskiĝis ideo fari tutan belartan programon en Esperanto por prezenti ĝin antaŭ la esperantistaro de Sofio.

Revuo „Bulgara Esperantisto“, 1958, n-ro 3—5, p. 14: „Esperanto-teatro. De 1.10.1957 ĝis 1.5. 1958 en teatro „Trudov Front“ funkciis kurso kun kursgvidanto M. Langov. Dek kvin geartistoj de la sama teatro lernis diligente Esperanton, lernante parkere versa-

jojn, rakontojn, humuraĵojn kaj teatraĵojn. Tiel elkreskis Esperanta teatra trupo el profesiaj geaktoroj. Ĝi estis registrita kiel amatora Esperanto-trupo ĉe BEA.

La 19-an de majo 1958 la trupo debutis, prezentante sian unuan Esperantan spektaklon en la salono de teatro „Trudov Front“. Estis interpretitaj verkoj de bulgaraj kaj sovetaj verkistoj, same la teatraĵetoj „Raporto pri la paco“ de B. Aprilov, „Eksedziĝo“ de N. Sionova kaj „Analfabeto“ de Br. Nuŝić.

Krom „Analfabeto“ (presita eldonaĵo), la aliajn verkojn esperantigis nia instruanto M. Langov. Por mi li faris bonegan tradukon de la poemo „Kaliopa“ de nia klasikulo P.K. Javorov: belsoneco, ritmo, taŭga vortaro por iuj specifaj malnovaj bulgaraj vortoj! Pro tio, „Kaliopa“ veturis de Greklando ĝis Ĉinio. Bedaŭrinde mi ne plu posedas tiun ĉi tradukon. La duopo Beleva — Anev rolis en la plenumura tre morale trafa teatraĵeto „Eksedziĝo“. Anoncante de la programo estis Esperantina Triĉkova.

Oni nomis la spektaklon historia, ĉar unuafoje en Bulgario estis prezentita spektaklo de profesiaj artistoj sur teatra scenejo. Kaj estas notinde, ke la spektaklo havis grandegan sukceson. La samideanoj-aktoroj interpretis siajn rolojn en bona Esperanto. Rolis: Georgi Kerelezov, Gerasim Mladenov, Elena Penkova, Belka Beleva, Maria Andonova, Kostadinka Nedeva, Nikola Krăstev, Anani Anev, Stefan Conkov. Regisorino estis Stefka Prohaskova, kiu estis fervora samideanino.

La spektaklo estis prezentita duan fojon la 30-an de junio 1958 j. Tuj sekvis nova ĝojo. La estraro de BEA invitis nin partopreni en la arta programo de la 33-a Kongreso de nia Asocio en Varna. Je nia dispono ni havis la taŭgan scenejon kaj belan salondon de la tiea ŝtata teatro. La sama programo, la sama entuziasmo. La 20-an de julio okazis nia unua renkontiĝo ankaŭ kun eksterlandaj esperantistoj — gastoj de la nacia kongreso. Kiaj varmaj aplaŭdoj! Kiom da sinceraj salutoj! Sur la scenejon venis publiko — manpremoj, kisoj, salutvortoj, invitoj por eksterlanda gastado!

Cu ni vere bone deklamis kaj aktoris? Cu la esperantista publiko estas tiel kunsentema? Aŭ estas simple ĝojo, ke la lingvo Esperanto vivas, sonas sur scenejo, konigas al la publiko la verkojn de bulgaraj, jugoslavaj, rusaj aŭtoroj? Aŭ ĉio samtempe?

La teatra sezono 1958/59. La E-kurso daŭras. Venas nova instruanto — Kiril Drajev. Kiel kutime, la nostalgio al la unua instruisto ne foriras rapide. Sed nia propra intereso al la lingvo proksimigis nin al Drajev. Li konigis al ni la versaĵojn de Asen



Post la unua spektaklo — 19.05. 1958.

Grigorov, de Simeon Simeonov, tradukis en Esperanton belartajn materialojn el la repertuaro de la kolegoj. Niaj partoprenoj en la programoj de la sofia E-societo estiĝis pli oftaj. Unuvorte, ni esperantistigis. „Belegan spektaklon esperantlingvan faris la teatro „Trudov Front“, prezentante la sovetan familian komedion „La tago de la virino“, esperantigitan de la artistoj mem. Post la prelego artistoj-esperantistoj de la ĉefurba teatro „Trudov Front“ deklamis en Esperanto poemon de la poeto N. J. Vapcarov“. („Bulgara Esperantisto“, 1960/61).

Laŭ decido de CE de BEA, kies prezidanto tiutempe estis k-do Georgi Dolapčiev (kun granda atento al BET persone), la teatra trupo ricevis la feliĉan okazon partopreni en la granda kultura festivalo dum la jubilea 44-a UK de Esperanto en Varsovio (1-8.08.1959). Unua partopreno en Universala Kongreso, ĵa jubileo! Do kion prezenti? Al la koloso Ivan Vazov oni povas sin apogi! Decido: teatraĵo „Casantoj de oficoj“. Traduko: Kiril Drajev; regisoro: Stefka Prohaskova; dekoracioj: Milka Naĉeva. Rolas: Baltov, ministro — Anani Anev; avino Dona, lia patrino — Elena Penkova; Anička, lia filino — Belka Beleva, Valentina Borisova; Jeĉo Horov, dando — Konstantin Dimĉev; Kavidov, malriĉa oficisto — Nikola Krăstev; Baj Stanĉo, parenco — Gerasim Mladenov; Ilija — Pavel Dubarev; Stojanka, servistino — Maria Andonova; Terzijska, koke-ta virino — Kostadinka Nedeva; Bozduganski, ekstravaganca persono — Georgi Kerelezov; Dramkov, sekundanto — Georgi Georgiev.

Sed mi devis disiĝi kun Anička! Post tri monatoj mi estiĝos patrino.

La unuan saluton el Varsovio Anani sendis al mi per bildkarto

pri la belega monumento de Sopeno kun la flustranta al li saliko. Per la dua karto al mi venis vido de la Palaco de Kulturo kaj Scienco mem — tie okazis la UK. La tria — ekkrio de ĝojo: „Sukceso! Entuziasmo! Venko! Salutas vin, kisas vin, pensas pri vi Anani!“

La propra impresoj povus esti kortuŝa, sed la ĵurnalo — pli aŭtoritata:

J. „Literaturen Front“ (Literatura Fronto), 2.09.1959. Titolo „En unu vespero Vazov ridigis la mondon“.

... La spektaklo okazis en la solena halo de la Palaco de Kulturo kaj Scienco. Ceestis pli ol 3000 spektantoj, reprezentantoj de 43 landoj el ĉiuj partoj de la mondo.

... La prezento de „Casantoj de oficoj“ pasis kun brila sukceso. La bunta publiko, entuziasmigita ankoraŭ ĉe la unua sceno, interrompis ne unufoje la ludadon de la aktoroj per tondraj aplaŭdoj. ... Salutoj. ... bukedoj de la kongresa komitato. ... senĉesaj ovacioj. ... pritaksoj de kompetentaj personoj kiel Julio Baghy, Marjorie Boulton, Greene Douglas — regisoro el Londono, Maria Niemirowa — pola verkistino, Flego — franca aktoro kaj regisoro kaj aliaj atestas pri la entuziasmo de la sceneja majstro de la plenumantoj.“

Delka Ĉolakova en „BE“ de novembro 1959, p. 5. Titolo „La Esperanto-Teatro nin bonege plezurigis“. El la enhavo: ... La konata de ĉiuj esperantistoj Julio Baghy diris post la spektaklo: „Carmegiel Ludado, kostumoj, rekvizito — ĉio estas en senriproĉa harmonia stilo. Per via verkisto Vazov kaj liaj herooj vi translokigis min en la jarojn de mia junaĝo“.

... La teatro venkis multe da malfacilaĵoj kaj duboj kaj okupis indan lokon en la internacia Esperanto-movado.“

pri la e-propagando

ERARA PRAKTIKO

Plej ofte oni legas en esperantaj kaj neesperantaj eldonaĵoj, ke la iniciatoro kaj aŭtoro de la internacia lingvo Esperanto estas profesia okulisto. Iuj aŭtoroj mencias, ke li estas pola okulkuracisto, aliaj akcentas, ke li estas juda okulkuracisto, triaj preferas noti nur la profesion de Zamenhof — okulkuracisto.

Malmultaj aŭtoroj akcentas la fakton, ke Zamenhof konis preskaŭ dekduon da lingvoj kaj estis rimarkinda poligloto ne nur por sia epoko, sed eĉ por la nia: kiom multaj estas la personoj kun simila poligloteco eĉ inter la profesiaj lingvistoj?

Kaj kiam ni esperantistoj celas konvinki la neesperantistan publikon, ke Zamenhof posedis la necesajn kvalitojn por prepari taŭgan projekton de internacia lingvo kaj ke tiurilate lia projekto superas la aliajn antaŭ kaj post Esperanto kreitajn eĉ de famaj profesiaj filologoj projektojn, ĉu la plej esenca argumento estas la profesio de Zamenhof — okulkuracisto? Kial ne lia poligloteco? Kial ne ankaŭ lia talento de lingvisto?

Se ni akcentas al la granda lingva kulturo de Zamenhof kiel poligloto, al la fakto, ke Esperanto estas daŭre praktikata kaj evoluigata kolektive fare de milionoj da esperantistoj tra la mondo, formintaj organizitan Esperanto-movadon, al la rekono de Esperanto fare de gravaj ŝtataj kaj interŝtataj organoj kaj institucioj, citante eĉ nur UNESKO, la skeptikuloj komencos iom pli singarde paroli pri Esperanto.

Kiam ni analizas la fenomenon Esperanto antaŭ vasta neesperantista publiko el simila vidpunkto, oni ne dubus pri la lingvaj kapabloj de ties iniciatoro.

Sed kiam la esperantistoj senpripense kaj aŭtomate parolas kaj skribas, ke Zamenhof estis kuracisto, estas permesate al la publiko dubi ĉu tiu persono estas la plej taŭga por okupiĝi pri komplikaj lingvistaj problemoj, pri kreo de projekto de internacia lingvo. Ĉu oni ne rajtas supozi, ke tiu okulkuracisto estas simpla maniulo?

Kaj kiam al tiu malpropaganda menciado pri la profesio de Zamenhof oni aldonas ankaŭ tute nesciencajn kaj abstraktajn, esence malutilajn sloganojn kiel ekz. „Unu homaro — unu lingvo!“, „Esperanto — la dua lingvo por ĉiu homa!“ k. s., la neesperantista publiko rajte rezonados pri malseriozeco de Esperanto kaj de la esperantistaro.

Ĉu ankaŭ dum la ĵus komenciĝinta dua jarcento de Esperanto ni daŭrigu la kontraŭpropagandan praktikon de emfazado pri la profesio de Zamenhof, aŭ ni kaptu pli seriozajn argumentojn?

Nikola ALEKSIEV

KONSTANTA KAJ EFIKA INFORMADO NECESAS

Nun ĉiu homo en la evoluantaj landoj ĉiutage ricevas lavangon da informoj kaj sciigoj. Tio estas farata per kunsidoj, kunvenoj, radio, kino, televido, teatro, ĵurnaloj, flugfolioj, prospektaj, afiŝoj, ekspozicioj k. a. Pro troa informado direktata al ni oni turnas atenton nur al tiu, kiu estas trafe proponata kaj povas ekinteresi nin.

Informado kaj propagando, same kiel lernado kaj praktikado de Esperanto, estas la plej gravaj eroj de nia por- kaj peresperanta agado.

Tre ofte entuziasmaj esperantistoj informas pri Esperanto kaj propagandas ĝin sen konsideri la supre menciitan situacion. La uzataj propagandiloj estas amatore faritaj kaj pro tio ne povas ekinteresi la publikon. Alia grava kaŭzo, kiu faras nian propagandon malsukcesa: ĝi estas kampanja — unu-, maksimume dufoje dum la jaro, plej ofte lige kun organizo de kursoj.

Lastatempe ni tre malofte efektivas disaŭdigojn pri Esperanto per la nacia kaj la lokaj radiostacioj. Se ni proponus al ties gvidantoj interesajn materiaĵojn: faktoj, eldiroj, versaĵoj, sciigoj pri Esperanto kaj sonbendigitaj esperantaj kantoj, certe oni konsentus emisii Esperantajn programojn. Por fari tiaspecan propagandon tre bone helpas la materialoj presataj en la bulgar-lingva revuo „Informacia Esperanto“.

Alia tre konvena formo de informado kaj propagando por nia movado estas la vitrinoj. Mi scias, ke deko da societoj en Bulgario havas vitrinojn sur centraj stratoj de iliaj urboj kaj en fervojaj stacidomoj. Vitrinoj oni aranĝas plej ofte en magazenoj kaj lernejoj. Multajn personojn oni varbis por Esperanto kaj por nia movado per tiaspeca informado. Kelkfoje, promene en iuj urboj, mi sukcesis kontakti lokajn esperantistojn pro tio, ke en la hazarde viditaj esperantaj vitrinoj kaj montrofenestroj estis adresoj de personoj, de kiuj oni povas ricevi pli da informoj pri la lingvo kaj la movado. Tamen, por ke ni havu multajn montrofenestrojn kaj vitrinojn, provizitajn per freŝaj materialoj, estas necese ke oni regule provizu ties prizorgantojn per konvenaj propagandiloj preparitaj de BEA.

La Centra Estraro de BEA estas konvinkita, ke per montrofenestroj kaj vitrinoj ni tre bone propagandas. Pruvo de tio estas la kelkaj specialaj konstantaj vitrinoj apud la asocia sidejo en Sofio.

Nikola NIKOLOV

KIEL VARBI LA JUNULARON?

Propagando por Esperanto direktita al ĉiuj, ne estas efika. La sperto montras, ke necesas konsideri la aĝon kaj la socian grupon de la homoj. Ekzemple, propaganda laboro inter infanoj ege diferencas de la propaganda laboro inter intelektuloj.

Ĉar la estonto apartenas al la junularo, la demando pri Esperanto-propagando, direktita speciale al la junularo staras kun sia tuta graveco kaj aktualeco.

Oni prave povas aserti, ke la bulgara junularo de la 80-aj jaroj ne estas la sama, kompare kun la junularo de antaŭ 20 jaroj, kaj eĉ de antaŭ 10 jaroj. Kio do ŝanĝiĝis? Kio karakterizas la nuntempan junularon en nia lando?

— Nun la junularo uzas la informan fluon, kio faras ĝin kvazaŭ kunpartoprenanto en ĉio okazanta en nia mondo.

— La hodiaŭa lernejo pli ol ĉiam estas senpere ligita kun la praktiko — t. e. kun la profesio. Tial ni povas paroli pri la junularo kiel unueca grupo.

— Nun multe pli alta estas la kleriga kaj profesia nivelo de la junularo.

— La nuntempa junularo estas atestanto de la proceso de amasa aplikado de la scienc-teknikaj atingoj al la vivo, ofte eĉ aktiva partoprenanto en tiu proceso.

— La nuntempa junularo havas sufiĉe da libera tempo por ĝui la kulturajn valorojn kaj mem partopreni aktive en la kreo de kulturaj valoroj.

— Ege kreskis la eblecoj por senperaj kaj korespondaj kontaktoj.

Gis nun, propagandante Esperanton inter la junularo, ni prezentis ĝin nur kiel bonegan rimedon por komunikado kaj kiel eblecon vojaĝi.

Ne ignorante tiujn du aspektojn de la Esperanto-propagando, ni devas konfesi, ke hodiaŭ ili ne sufiĉas por altiri la junularon al la Esperanto-movado. Des pli ke lastatempe ege kreskis la rolo de la angla lingvo. Kaj tio, kompreneble, influas la Esperanto-propagandon.

Laŭ mi oni devas klarigi al la junularo, ke Esperanto povas esti ankaŭ bonega rimedo por akiro de diversaj scioj kaj por plialtigo de la profesia kvalifiko, por ricevo de modernaj scienc-teknikaj kaj fakaj informoj kaj por kultura interŝanĝo.

Por la celo oni devas efektiviĝi:

— pli amasan propagandon al la junularo per modernaj formoj, konsiderante la specifajn trajtojn de la nuntempa juna generacio;

— verkadon kaj eldonadon de Esperanto-lernolibro de la junularo;

— amasan intervenon de la scienco kaj tekniko en la Esperanto-instruadon inter la junularo;

— disvastigon inter la junularo de sciencaj, teknikaj kaj kulturaj eldonoj en Esperanto;

— plialtigon de la eblecoj por apliko de Esperanto kiel laborlingvo de junularaj kaj fakaj aranĝoj, kun pli vasta partopreno de neesperantistoj;

— amasan partoprenon de la junularo en la agado de la esperantistaj fakaj organizoj kaj elekton de ĝejunuloj en ties estraroj;

— pli amasan interesigon pri Esperanto de junaj sciencistoj.

Tiel nia propagando direkta al la junularo estos multe pli rezultodona kaj nia movado nepre certigos al si lokon en la estonta mondo.

Ljubomir TRIFONČOVSKI,
estrarano de Bulgara
Esperanto-Junularo

NOTO DE LA REDAKCIO: Ni plezure publikigus ankaŭ aliajn opiniojn lige kun la temo kaj informojn pri konkreta propaganda laboro.

REVUO SERĈATA

Bulgara E-muzeo serĉas revuon „Orienta Kuriero“ (1938–1939) eldonata monate en Hongkongo, redaktata de Elpin kunlabore kun la hungara esperantisto Braun. Kontakto per tel. 32-77-21, Sofio.

ILEF-FESTIVALO OKAZIGOTA

En la jarkunveno de la unuigintaj organizaĵoj ILEF kaj TEJA, okazinta dum la Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio pasintjare, la estraro de ILEF anoncis sian decidon okazigi la Duan Internacian Festivalon de Esperantistoj Foto-Kino-Amatoroj en urbo Vraca (nord-okcidenta Bulgario) de la 10-a ĝis la 15-a de oktobro 1988, sub la devizo: „POR PACA MONDO, POR PURA CIELO KAJ AMIKECO“

La festivalon povas partopreni membroj de ILEF kaj TEJA, apartaj kino-foto kluboj kaj ties anoj per kolektivaj aŭ individuaj verkoj, en unu el la tri sekcioj (aŭ en ĉiuj tri sekcioj) de la festivalo: 1) Kino 2) Foto 3) Magnetofono — laŭ sia prefero, kondiĉe ke la verkoj respondas al la devizo de la festivalo.

— En sekcio „Kino“ povas esti prezentitaj ne pli ol 5 amatoraj filmoj de ĉiuj ĝenroj (sur 8-mm, „Super-8“ aŭ 16-mm filmbendoj, koloraj aŭ nigra-blankaj), sonigitaj aŭ kun aparta sinkronigita sonigado sur magnetofona bendo.

— En sekcio „Foto“ povas esti prezentitaj apartaj fotografaj aŭ serio da fotografaj (unucaj laŭteme), ĝis 15 verkoj, koloraj aŭ nigra-blankaj, formato 18/24 cm, 24/30 cm kaj 40/50 cm — kun taŭga moto aŭ subskribo. En la konkursa programo povas esti prezentitaj ankaŭ koloraj diapozitivaj — ĝis 50 verkoj de ĉiu konkurso.

— En sekcio „Magnetofono“ povas esti prezentitaj surbendigoj de eldiroj de eminentaj agantoj de la monda E-movado, de individuaj aŭ kolektivaj plenumoj de esperantaj kantoj, deklamoj ktp. Ĉiu konkurso povas prezenti surbendigojn en kasetoj aŭ en bobenoj, kies tempodaŭro estas ne pli ol 1 horo.

Noto: Por eviti eventualan perdon aŭ neniigon de filmoj, fotoj aŭ surbendigoj, ĉiuj konkursoj devas kunporti siajn konkursaĵojn kaj mem prizorgi ilin antaŭ kaj post ilia prezento en la konkursa programo. La konkursoj estas petataj sciigi la Organizan Komitaton pri la nombro de siaj konkursaĵoj, pri iliaj temo, formato kaj tempodaŭro, por ke oni povu plani ilin en la programo.

Speciala jurio prijuĝas la konkursaĵojn en ĉiuj sekcioj kaj aljuĝos premiojn (unua, dua, tria kaj kuraĝiga — po unu en ĉiu sekcio).

La Granda Premio estas „Fluganta argenta kolombo“, laŭ projekto de Joé F. Arroyo el Hispanio.

Al ĉiuj partoprenantoj en la festivalo estos disdonitaj specialaj diplomoj-atestiloj.

Al ĉiuj partoprenantoj estos certigitaj bonaj vivaj laborkondiĉoj je malaltaj prezoj. Varia festivala programo kaj ekskursoj en la pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj de Vraca estas planitaj.

Ĉiu deziranto partopreni en la festivalo devas sendi konfirmleteron ĝis la 31-a de aŭgusto 1988 (validas la poŝta stampo!) laŭ adreso de la Centra Oficejo de ILEF — bulv. Hristo Botev 97, 1303 Sofio, Bulgario — por la Dua ILEF-festivalo en Vraca.

La Dua ILEF-Festivalo estu nia grava arta kaj porpaca manifestacio!

Gastamaj vracanoj atendas vin!

La Estraro de ILEF

La metodo de Andreo Cseh

Elstara Cseh-metoda instruisto dividas sperton

Lastatempe en nia lando oni atingis gravajn sukcesojn en la instruado de Esperanto. Kiel ni jam scias, la Ministerio de Klerigo enkondukis fakultative Esperanton en la 9-a kaj 10-a klasoj de la bulgaraj mezlernejoj. En kelkaj la lernado eĉ estas deviga. Oni instruas Esperanton fakultative en la superaj institutoj en Gabrovo, Plovdiv, Svištov, en la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“ kaj en tri altlernejoj en Varna — en la Supera Maŝinelektra Instituto, en la Supera Medicina Instituto kaj en la Supera Ekonomia Instituto (SEI) „Dimităr Blagoev“. La intereso al ĝi fare de gelnantoj kaj gestudentoj estas granda.

En „Bulgara Esperantisto“ ofte aperas artikoloj pri la instru-problemoj. Do nun ankaŭ mi volas kontribui, tuŝante la problemon pri la metodoj de E-instruado kaj pli speciale pri la metodo de Andreo Cseh (Ĉe).

Preskaŭ seninterrompe, ekde la jaro 1936, mi instruas Esperanton laŭ la mirakla CSEH-metodo. Oni ja scias, ke instruante laŭ tiu ĉi metodo la lernanto de Esperanto ne uzas lernolibron. Ankaŭ al miaj gestudentoj en SEI „D. Blagoev“ en Varna, mi instruas laŭ la Cseh-metodo, do sen lernolibro. Tamen speciale por miaj gestudentoj mi verkis lernolibron „Kurs po Esperanto“ (Kurso de Esperanto). Kial? En la „Metodikaj notoj“ (p. 3—7 en mia lernolibro) mi iom diskutas kun la aŭtoro de la Cseh-metodo. Cseh skribas: „Sen lernolibroj okazas la kursoj pro du gravaj kaŭzoj: Unue, ĉar entuziasmaj lernantoj ofte antaŭlernas kaj per tio ili konfuzas sin mem, aŭ ĝenas la progresadon de la aliaj. Due, ĉar la lernolibro ofte kutimigas al malordo. Bela vetero, interesa filmo aŭ societo facile forlogas la lernantojn de la leciono, ĉar ili ja povas relerni la lecionojn hejme el la libro. Dum la leciono la sama preteksto tentas al distrigo. Sed nehavante libron oni devas regule viziti la kurson kaj streĉi la atenton.“

Ĉi tiuj argumentoj de Andreo Cseh estas tute pravaj, kaj oni povas konsideri ilin. Sed laŭ mia sperto la avantaĝo, kiun prezentas neuzado de lernolibro estas samtempe malavantaĝo, manko. Kial? Ĉar, kvankam estas nepre necese kaj dezirinde, bedaŭrinde ne ĉiam estas eble, ke ĉiu kursano vizitu centprocente regule la lecionojn. La kaŭzoj povas esti plej diversaj: malsano, grava okupo ktp. Do, se pro ia ajn kaŭzo la lernanto ellasas iun lecionon, en la sekvanta leciono li sentas sin embarasita, baldaŭ perdas intereson kaj... forlasas

la kurson. Kompreneble, tio tute ne estas dezirinda, ĉar ofte simile defalintajn kursanojn oni povas malfacile altiri al nova kurso, kelkfoje ili eĉ estiĝas kontraŭuloj, malamikoj de Esperanto. Sed havante lernolibron, la lernanto povas facile „plenigi“ la mankojn, kaj trankvile daŭrigi siajn okupojn. Krom tio la lernolibro estas bona konsultato. Tiuj kaj ankaŭ pluraj aliaj konsideroj faras la lernolibron necesa ankaŭ en la Cseh-metodo. Tial miaj gestudentoj havas lernolibron. Sed, kompreneble, dum la lecionoj mi neniam uzas lernolibron!

Laŭ Andreo Cseh la nombro de la kursanoj devas esti inter 20 kaj 40. Pli aŭ malpli alta nombro ne estas utila.

La nombro de mia kursano estas diversa. Iam en la Ekonomia Altlernejo en Varna mi gvidis printempan kurson por gestudentoj kaj geurbanoj. En la komenco enskribiĝis 65 personoj, kaj en la fino mi havis 107 gekursanojn. (Bv. vidi la artikolon „Observoj de kursgvidanto“ en „Nuntepa Bulgario“ n-ro 9/1863, aŭ p. 213—218 en mia „Kurso de Esperanto“). En la polaj grupoj ordinare partoprenas 40—50 personoj. En la Supera Ekonomia Instituto „D. Blagoev“ en Varna, kie Esperanto estas fakultative studata (depost 1963), la nombro de la studentoj varias. Foje enskribiĝis 200 gestudentoj, dezirantaj lerni la Internacian Lingvon. Dum la lernojaro 1985/1986 mia grupo konsistis el 16 personoj. Kaj dum la nuna lernojaro — el 20 personoj.

En la lernejo por blindaj infanoj „Georgi Dimitrov“ en Varna mi instruis Esperanton al 12 gelnantoj, ĉar en la klasĉambro estas po 6 benkoj. Por la unua fojo en mia vivo mi instruis Esperanton laŭ Cseh-metodo al blindaj infanoj. Ili estis tre diligentaj kaj mi — tre kontenta. La sekvantan jaron mi havis kurson kun 7 gelnantoj (en la kurso por progresan-

toj), ĉar la 5 aliaj jam finis tiun ĉi lernejon, kaj nun studas en aliaj lernejoj en Sofio, Plovdiv kaj aliloke.

La tempodaŭro de la kurso por gestudentoj estas du semestroj — po 2 horoj semajne, entute ĉ. 60 horojn. En Finnlando la kursoj daŭris 10 tagojn por 4 horoj tage. La kurso en Burgas (Meden Rudnik) kaj nun en IEK „Pisaniĉa“ — 3 semajnojn, en Varna („Zlatni Pjasaci“ (Oraj Sabloj) kaj „Albena“) — 2 semajnojn.

Gaja humoro estas ege necesa por ĉiu leciono, ĝis la fino de la kurso. Ĉiam en miaj kursoj regas entuziasmo, bonhumoro kaj fervoro. Pro tio ĉiam kun plezuro kaj amo mi instruas jam pli ol 50 jarojn laŭ la vere mirakla, dinamika kaj rezultodona Cseh-metodo.

Jen mi priskribas unu konkretan instruhoron nome la unuan lecionon laŭ Cseh-metodo, el mia praktiko, kun detala komentario.

La celo de la instruhoro estas: sen uzo de gepatra lingvo fari konversacion en Esperanto.

Instruenda materialo estas: sinprezentado, la demandaj vortoj KIU?, KIO?, KIA? kaj CU. La personaj pronomoj: mi, vi (ĉi), li, ŝi, ĝi. Profesioj. La sufikso „IN“. La nomoj de kelkaj objektoj — per demonstrado: kreto, lampo, pordo, rozo, floro, benko, tablo ktp. La koloroj. La negacia vorto „NE“. Strukturoj. Salutformoj.

La unua kanto, kiun mi instruas per violono, estas la pola popola kanto „Knabineto arboreton...“, ĝin sekvas la gaja hungara kanto „Zime-zum“, ka.

Instruhelpiloj: kasetofono, violono kaj diversaj objektoj por demonstrado: rozoj (ruĝa, blanka, flava), hiacinto, krizantemoj, skatoloj, paperoj, ludiloj (hundo, kato, urso, azeno, leono) ktp. „Pedagogia meblo“ (vd. detale en la Cseh-kurso). Ofte mi prezentas ankaŭ diapozitivajn, ekz. pri Islando, la lando de kontrastoj: vulkanoj, varmegaj gejseroj kaj grandegaj glaciejoj. Ankaŭ pri Finnlando — la lando de pli ol 62 mil lagoj, pri Svislando, pri Lucerno — la ĉefurbo de la 64-a UK de Esperanto kaj pri Pollando — la nas-

kiĝlando de Esperanto k.a. Ĉio ĉi vekas intereson, ĉar dank' al Esperanto mi havis la feliĉon viziti tiujn belajn kaj interesajn landojn.

Granda parto de miaj kursoj estis internaciaj. Ekzemple en Pamporovo, en IEK-Pisanica, en Burgas (Meden Rudnik), en Varna, en Vääksy (legu: Veeksju, Finnlando) k.a. Ofte en miaj kursoj estas gekursanoj el kelkaj nacioj. Mi bone memoras, ke en unu el miaj kursoj en Pamporovo partoprenis du italoj (geedza paro), unu franco, germanoj, poloj, ĉeĥoj, bulgaroj kaj unu usonano. Do bukedo el diversnacieco.

Ordinare en la komencaj lecionoj la Cseh-metoda instruisto bezonas la helpon de tradukisto „ne multe por la instruata materialo mem, sed por rompi la eble enuigan monotonecon de la gramatikajoj“ — A. Cseh.

Ce la komenca leciono la organizanto de la kurso prezentas min en la nacia lingvo de la aŭditorio. Sed ofte okazas, ke mi mem devas prezenti min al la publiko. Mi eliras mian pasporton el la poŝto kaj legas: „Georgo Dimov“.

Ege grave estas por mi, ĉu la grupo, al kiu mi devas instrui Esperanton, konsistas nur el bulgaroj, aŭ nur el poloj, hungaroj, aŭ estas internacia. Se estas **nur poloj** en la grupo, pere de interpretisto tuj en la komenco mi rakontas al la gekursanoj: Kial mi sentas min ŝuldanto al Esperanto kaj al la bela lando Pollando. Mi rakontas al ili, kiel dank' al D-ro Mieczyslaw Zamenhof (nepo de nia majstro D-ro L. L. Zamenhof) — la vivo de mia frateto Totko (karesnomo de Todor) estis savita (vd. la artikolon „Neforgesebla

rememoro“ en „Bulgara Esperantisto“ n-ro 5/1986) kaj la historieton „Nia ora libro“ sur p. 220—221 de mia „Kurso de Esperanto“. Mi finas per la vortoj: „Mi ne sukcesis elŝuldiĝi al D-ro M. Zamenhof, sed se vi estos „pilni“ (en pola lingvo tio signifas „diligentaj“), vi donos al mi eblecon iomete elŝuldiĝi al tiu bona polo“.

Se en la kurso estas **nur bulgaroj**, mi atentigas ilin pri la karakterata prononco de la Esperantaj vokaloj kaj certaj konsonantoj. Ekzemple pri la sono „a“, kiun la bulgaroj ofte reduktite prononcas kiel en la bulgara vorto „Tárnovo“, aŭ en la angla vorto „but“ (sed), kio en tiuj lingvoj estas natura, ne estas permesata en Esperanto. Ekz. la vorton „estas“ oni ne devas prononci „estás“. La vokalo „e“ ofte aŭdiĝas ĉe bulgaroj „i“, la vokalo „o“ aŭdiĝas „u“. Ekz. anstataŭ „kinno“, „vino“, la bulgaroj prononcas „kinu“, „vinu“. Mi speciale atentigas miajn samlingvanojn pri la prononco de la konsonanto „l“, kiun ni, bulgaroj, prononcas iom malmole, pri la litero „g“, kiu tute ne ekzistas en nia alfabeto, ankaŭ pri la prononco de la konjunkcio „sed“, kies lasta konsonanto senvoĉiĝas, do aŭdiĝas „set“ ĉe bulgaraj parolantoj.

Dum la unuaj instruhoroj mi kunportas mian kasetofonon, kaj mi plurfoje aŭdiĝas la unuajn lecionojn de Andrzej Pettyn el lia kurso „Ĉu vi parolas Esperante?“, por ke miaj gekursanoj aŭskultu modelan Esperantan prononcon.

En 1979 en Vääksy (Finnlando), mi gvidis kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Mi ne supozis, ke en tiu lando mi havos problemojn kun iuj sonoj el la alfabeto de Esperanto. Mi registris kelkajn

respondojn de miaj gekursanoj per kasetofono. Mi demandas: „Ĉu vi ŝatas la finnan ĉokoladon?“ Kaj jen la respondo: „Jes, mi ŝatas la finnan ĉokoladon“. Do estis problemoj pri „ŝ“, ĉ kaj ĝ.

En la internaciaj kursoj mi preferas uzas Esperanton, sed ĉe ekstremaj okazoj helpas al mi miaj iomaj scioj de la franca, germana, angla, rusa, itala, rumana, slovak, pola, turka kaj serbokroata lingvoj. En la komenco mi klarigas al la gekursanoj, ke ili ne konsideru la kurson kiel lernadon de lingvo, sed kiel **praktikan konversacion** en Esperanto. Ni ne bezonas lernolibron, do ni ne uzas ĝin dum la konversacio. Ni bezonas nur kajeron, skribilon kaj atenton! Estas nepre necese partopreni ĉiun lecionon. Post tiuj vortoj ni revenas al la sinprezentado. Mi ripetas: „Mi estas Georgo Dimov“, ĉi tiun frazon mi skribas sur la nigran tabulon, kaj mi tuj demandas: „kiu estas mi?“ kaj la respondo: „Vi estas G. D.“ Poste pri la profesio. Mi skribas sur la tabulon: „Mi estas instruisto“. Kio mi estas? — instruisto. Kio vi estas? — lernanto, lernantino, studento — studentino ktp. Mi skribas la sufikson „IN“ per ruĝa kredo. La kursanoj kutime mem „malkovras“ la rolon de la sufikso „IN“. Poste ni lernas la kolorojn: blanka, ruĝa, verda ktp. La demanda vorto estas: KIA? kaj la adjektivojn: bela, bona, sana, juna, forta, riĉa, feliĉa. Poste la vorteton „ĉu“ „jes“, kaj „ne“ kaj la salutvortojn „Bonan matenon, tagon ktp. Ĝis revido!“

Doc. Georgi DIMOV

(Daŭrigota)

Leteroj de korespondamikoj

ANIAJ HUNGARAJ SAMIDEANOJ

Jam kelkajn jarojn la esperantista grupon „Ujlaki“ en Budapeŝto kaj E-societon „Penka Miĥajlova“ en Sofio kunligas sincera, sencoplena amikeco. Flugas leteroj inter ambaŭ societoj. Jen kion rakontas pri sia agado la gemembroj de grupo „Ujlaki“ en sia letero de la 21-a de januaro 1988, skribita de ilia sekretario György Beresztóczy al la prezidanto de nia societo Stefan Sokolov: „... Pasintjare ni varbis novajn membrojn honore al la 100-jara jubileo de Esperanto. Nun nia membraro nombras 39 aktivajn kaj 24 subtenantajn membrojn. Por ni estas ĉiam grava tasko aranĝi la programojn de niaj kunvenoj tiel, ke kaj la progresantoj kaj la komencantoj trovu por si konvenajn aranĝojn laŭ la nivelo de sia lingvokono. Ni ofte kantas Esperante, rakontas anekdotojn, aranĝas amuzajn dialogojn, rakontas pri la vivovojo de naciaj kaj internaciaj eminentaj personecoj. ...“

Ni ĉiujare abonas revuon „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ por niaj amikoj el Esperanto-grupo „Ujlaki“. Jen

kion rakontas ili lige kun tio en sia letero de la 22-a de marto 1988:

„Karaj gesamideanoj el Sofio, hodiaŭ ni aranĝis programon pri la revuo „Bulgara Esperantisto“.

Antaŭ kelkaj semajnoj ni disdonis inter la grupanoj numerojn de la revuo. Ili tralegis la ricevitajn ekzemplerojn kaj hodiaŭ ili informis la grupanaron pri la enhavo de kelkaj interesaj artikoloj. Nin ĉiujn multe impresis via altnivela revuo. Ni tutkore gratulas vin kaj deziras al vi ĉiuj pluan sukcesan laboron, bonan sanon. Multan dankon pro la ricevitaj numeroj 1 kaj 2/1988. Kun varmaj salutoj — membroj de Grupo „Ujlaki“ en Budapeŝto.“

Sekvas ĉirkaŭ dudek subskriboj de niaj hungaraj geamikoj.

Maria P. ANGELOVA

LA FORTAJ RADIKOJ DE LA VIVAMO

En la bela montara urbeto Kotel ankaŭ nun estas viva la bulgara renesanca spirito, malgraŭ ke en la XIX jarcento kelkaj incendioj neniigis multajn bele-gajn domojn, multe da malnovaj libroj. Estis savitaj nur kelkaj stratetoj, kiuj hodiaŭ formas etnografian komplekson. La pitoreska strateto kun la nomo de montara drogherbo, „Tintjava“, krute zigzagas malsupren. En malnova domo, sub numero 3, vivas persono tre konata en Kotel — Bojil Draganĝikov.

Pli ol okdekjara, Baj* Bojil tamen estas laborkapabla kaj vigla. Ni sidas en lia domo kaj interparolas. Antaŭ mi kuŝas leteroj de esperantistoj el Bulgario

kaj el diversaj fremdaj landoj. La bildkartoj estas zorge aranĝitaj en albumoj. Baj Bojil foliumas la paĝojn, lia mieno vigligas, li ĝojas, ĉagrenas. Malantaŭ lia dorso estas pli ol 50 jaroj valorigitaj de Esperanto.

Bojil Draganĝikov konstante zorgas gajni novajn adeptojn de Esperanto, kvankam en malgranda loĝloko kiel Kotel tio ne estas facila afero. Li daŭrigas gvidi kursojn, kolektas ĉirkaŭ sin la esperantistojn en Kotel. Baj Bojil estas tre tolerema kaj malkonservativa homo kaj la junuloj estas liaj bonaj amikoj.

Fakte, la okupoj de baj Bojil pri Esperanto estas ligitaj kun la alia lia amo — la fotografio. Antaŭ

100 tagojn en Bulgario

DANG DINH DAM,
sekretario de VPEA

(Daŭrigo de n-ro 5/1988)

Sofio hodiaŭ brilas en bela printempo (dume en nia lando estas somero!) En tiu ĉefurbo fame gastama kaj amika, komenciĝas la plej mirindaj kaj signifoplenaj tagoj en nia vivo, ĉi tie montriĝos antaŭ niaj propraj okuloj ĉio, kion ni delonge legis, aŭdis pri la plej granda centro politika, ekonomia, kultura, turisma kaj esperanta de la miljara lando Bulgario, kies simbolo estas la rozo.

Mia revo viziti Bulgarijon estis realigita en aprilo de 1985, kiam VPEA¹ ricevis leteron, per kiu CE de BEA invitis nian dupersonan delegacion al la 18-a Konsultigo de SLEOJ en Pisanica. En tiu konsultigo oni unuanime akceptis la proponon de VPEA pri la efika helpo flanke de socialismaj organizaĵoj por plialtigi kaj perfektigi la lingvo-nivelon de la E-kadruloj de Vjetnamio. BEA estas la unua Asocio, kiu volonte akceptis nian proponon kiel sian internacian devon, havis tujan planon helpi du vjetnamajn kandidatojn por lingvoperfektiĝo en Bulgario dum 2—3 monatoj en venontaj sinsekvaj jaroj.

La 6-an de majo, ĉe la oficejo de BEA ni havis la unuan renkontigon kun k-do Ĥristo Gorov, tiama prezidanto de BEA², kiu kun kelkaj estraranoj gaje bonvenigis nin, poste ni interdiskutis pri la aferoj. Antaŭ ĉio, mi transdonis al la Estraro de BEA dankleteron de la Estraro de VPEA pro tiu modele nova helpo al la vjetnama E-movado, kaj informis pri la preparo kun nia Vjetnama Ambasadorejo en

Sofio por transdoni la „Ordenon de Amikeco“ de la Ŝtat-konsilantaro de Vjetnama Socialisma Respubliko (VSR) al k-do Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, pri la projekto presigi la libron „Mia vivo“ de Trifon Ĥristovski en la vjetnama lingvo. Kaj de la prezidanto ni ricevis la konkretan programon por nia laboro.

La saman tagon, ni ankaŭ havis renkontigon kun la ĝenerala sekretario de BEA k-do Dimitar Papazov, kiun mi persone konis de 1979. Kun D. Papazov mi antaŭe havis interesan diskuton pri la stato kaj laboroj de ambaŭ E-organizaĵoj dum la 15-a Konsultigo de SLEOJ en Ereveno (1982).

Vespere, ĉe nia hotelo, ni konatiĝis kun gesamideanoj Vasil Vutov kaj Stefka Ĉenkova. Ambaŭ estas BEA-kadruloj, gajoplenaj kaj bonkoraj.

PLOVDIV

La 7-an de majo, nia programo komenciĝis per trajna vojaĝo de Sofio al Plovdiv dum 4 horoj. Niaj akompanantoj estis Kalinka Vasileva kaj la verkisto-poeto Georgi Mihalkov. Tiu lasta akceptis nin en sia oficejo matene de la antaŭa tago kaj ĝuis kune kun ni tre utilan kaj plezurplenan promenadon tra la urbo.

Bonvenigis nin DE de BEA en Plovdiv — ĉiuj tre okupataj en preparo por la programoj dediĉitaj al la centjarigo de Esperanto.

Ni promenis en la dua laŭ grandeco urbo de Bulgario, situanta en la mezo de la Trakia Valo, ĉe la du bordoj de rivero Marica. Gi majeste staras sur ses montetoj, kun siaj multaj kultur-monumentoj, kiuj fiere rakontas pri ĝia 60-jarcenta historio. Tie ĉi, en 1901, aperis „Stelo“ — unua loka esperantista klubo, kies nomo ligiĝas kun la sindonemaj adeptoj de L.L. Zamenhof, el kiuj la unua pioniro estas Georgi Oreŝkov. Mi opinias, ke tiu verda „Stelo“ — unua sukceso de la Plovdiva esperantistaro, kun sia organo „Rondiranto“, restas ĉiam kiel lumturo por ĉiu landa E-movado en sia celo popularigi kaj propagandi la ideon pri akcepto de la Internacia Lingvo kiel ilo de interkomprenigo inter diversaj popoloj. Kaj ŝajnas al mi, ke hodiaŭ ĝia lumo hele brilas super tiu bela urbo kun arroj da kolomboj libere flugantaj aŭ moviĝantaj sur la stratoj, en la vigla atmosfero de la ĉiujara tradicia Internacia Foiro.

La 8-an de majo, en la salono ĉe str. „Ĥr. Kârpaĉev“ — la, malfermiĝis la 3-a Renkontigo de Literatura Rondo „Asen Grigorov“ — Sofio, kun la „Arta Klubo“ 84 — Plovdiv, kaj la sekvanta tago, la 14-a Foiro Internacia Esperanto-Renkonto. Partoprenis ambaŭ solenajn centoj da reprezentantoj el diversaj urboj: Sofio, Plovdiv, Varna, Kubrat, Gabrovo, Ĉepelare, Vidin, Ŝumen ktp. . . kaj eksterlandaj gastoj el Hungario, GDR CSSR kaj Vjetnamio.

En la nomo de VPEA kaj de la vjetnama esperantistaro mi salutis la kunvenintojn kaj de tiu solena tribuno sendis varmajn bondezirojn al la frata bulgara esperantistaro kaj niajn sincerajn dankesprimojn. Ankaŭ mi plenumis por la ĉeestant-

pli ol kvin jardekoj, kune kun Boris Kirov, li malfermis la unuan fotoatelieron en Kotel. De tiam Bojil Dragankov ne disiĝas kun sia plej ŝatata posedaĵo — la fotilo.

El siaj fotoj li preparis unu el la plej interesaj ekspozicioj en Bulgario — pri la bonvenigo de la Soveta Armeo en septembro 1944. Ĝi konsistas el 250 fotoj.

En sia domo Baj Bojil havas riĉan bibliotekon, el esperantaj eldonoj kaj bulgaraj libroj. Li posedas ankaŭ kelkajn malnovajn librojn, el la unuaj jaroj de la bulgara libroeldonado.

Forveturante el Kotel, mi rimarkas ĉe la stacidomo esperantan vitrinon. Mi ne dubas, ke ankaŭ ĝin prizorgas la laboremaj manoj de Baj Bojil.

Atanas ILKOV

RENKONTIGO KUN LA REDAKTA KOLEKTIVO

La 13-an de aprilo j. k. en la ĉefurba tramejo „Stanjo Vasilev“ okazis renkontigo de la redakcia kolektivo de revuo „Bulgara Esperantisto“ kun E-societo „Verda Tramo“.

Lasto Nikov, prezidanto de societo „Verda Tramo“, rakontis pri la sukcesoj kaj la planoj de la esperantistoj.

Siaflanke la ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Maria Jankova parolis pri la historio, problemoj kaj estontaj taskoj de la revuo.

La ĉeestantoj detale informigis pri la redakcia laboro, faris kritikajn notojn pri la enhavo kaj formo de la revuo.

Similaj renkontigoj estas ege utilaj. Kun plezuro la redaktoroj de „BE“ partoprenos ankaŭ estonte similajn renkontigojn kun legantoj.

„BE“

Baj* — alnomo al pli aĝa homo

toj la vjetnaman popolkanton „Trans la ponto“ — en la vjetnama lingvo kaj en Esperanto.

Poste ni ĝuis la riĉajn programojn de deklamado kaj kantoj en vere internacia etoso. Krome, ni havis bonan okazon viziti la urbajn vidindaĵojn, la subĉielan antikvan teatron, la ekspozicion de artaĵoj, de esperantaj el diversaj landoj. Tre emocia momento por mi estis kiam mi estis proponita kiel unu el la eksterlandaj delegitoj por prezenti la florkronon ĉe la monumento de la Soveta Soldato sur la Monteto de Liberigintoj, kies karesa nomo „Aljoŝa“ vekis ĉe mi pensojn pri la eterna frateca simbolo, rememorigis al mi la figuron de bela, brava junulo en la fama sovetala filmo titolita „Balado pri la soldato“, kiu estis plurfoje prezentita kaj ankoraŭ prezentata en nia lando okaze de la 70-a Jubileo de la Granda Oktobra Revolucio.

La ĝojaj tagoj pasis rapide kaj venis la disiĝo — per intima adiaŭa vespero ĉe mangotabloj plenaj de bongustaj trinkaĵoj kaj mangaĵoj. Oni kaptis la okazon interŝanĝi adresojn, kune kanti, danci ĝis malfrua nokto. Kompreneble, ju pli ĝoja estas la renkontigo, des pli malĝoja estas disiĝo. Tamen ĉiuj el ni havas la saman esperon, ke ni povos ankoraŭfoje revidi nin ĉu en Sofio, ĉu en iliaj naskiĝurboj, ĉu en Varsovio — lulilo de Esperanto, okaze de la 72-a UK.

PISANICA — SMOLJAN

La 10-an de majo per aŭtobuso ni forlasis Plovdivon kaj ekveturis al la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica, kie ni povis trankvile labori kaj ripozi dum 20 tagoj.

La Internacia Esperanto-Kursejo kun verda stelo majeste staras sur larĝa tereno de la vilaĝo Pisanica, kiu situas inter montoj kun verdaj arbaroj. Ĝi estas unu el la plej gravaj atingoj dum la 80 jaroj de ekzistado de BEA, fiero kaj paradizo de esperantistoj bulgaraj kaj eksterlandaj. Ĝi allogas ĉiujn esperantistojn ne nur kiel la plej granda E-centro kun modernaj kaj oportunaj rimedoj por lerni kaj studi la Internacian Lingvon, sed ankaŭ kiel pitoreska ripozejo kun freŝa aero, abunda verdaĵo, ondaj montetoj sub hela ĉielo, aparte mirinda en la tagoj de majo.

Tie, mia tasko estas fintruduki la libron „Mia vivo“ de Trifon Hristovski en la vjetnaman lingvon, dume mia kolego devas tajpi la manuskripton, kaj plibonigi sian lingvokonon sub la gvido de s-ino Kremona Baceva, konstanta instruistino ĉe IEK.

Miaflanke, ĉiutage mi klopodis bone plenumi mian tradukon — almenaŭ po unu ĉapitro, kaj kune kun mia kolego faris mallongan promenadon en frua mateno kaj en antaŭkrepuska vespero. De tempo al tempo venis ĉi tien turistaj grupoj el Smoljan, el Plovdiv, el Pollando, sed bedaŭrinde neniu esperantisto.

La 20-an de majo, jam tute libera de la plenumita traduko, krom la kutima ĝuado, mi revas pri io nova por niaj lastaj tagoj antaŭ ol reveni Sofion.

La saman posttagmezon, sidante sur la akcepteja divano, mi vidis virinon kun granda valizo, eniranta, haltanta antaŭ la akceptantino kaj esperante farinta kun la lasta protokolon por sia restado en IEK. Mi sentis ĝojon, dirante al mi —

kia vento alblovas al mi tiun verdan amikinojn? Miaj salutparolo kaj propono kunporti ŝian valizon al la ĉambro emocigis ŝin, kaj kompreneble ni tuj fariĝis amikoj kaj kune ĝuis interesajn interkonatojn kaj ekskursojn. Ŝi estas hungara esperantistino kun la nomo Perlaki Jenoné (Margaréta), membro de la Kontrola Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto, tial niaj interparoloj temas ne nur personeco, sed ankaŭ pri ambaŭ asocioj, kiuj ja ankaŭ havas tradician amikecon.

La 21-an de majo, ŝi petis min kune veturi al la urbo Smoljan, kie atendis nin ŝia korespondanto Boris Angelov, ĉefinspektoro de Popola Klerigo en la distrikto de Smoljan. La renkontigo estas duobla ĝojo, ĉar la gastiganto estas ĝuste tiu, kiu kun la lokaj esperantistoj akceptis min en 1985 okaze de la 18-a Konsultigo de SLEOJ. Ĉu en Smoljan, ĉu en Pisanica aŭ en Pamporovo, ŝajnas, ke la aero estas pli pura, la ĉielo — pli blua kaj la pejzaĝoj pli belaj antaŭ la grupo da esperantistoj bulgara, hungara, vjetnama.

La 25-an de majo nia hungara amikino devis reveni Budapeŝton. Ni akompanis ŝin ĝis la aŭtobusa stacidomo en Smoljan. Ho ve! La adiaŭo estas iom dolora, malgraŭ ke ni esperas pri denova renkontigo en Varsovio.

(Daŭrigota)

1) VPEA — Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio

2) Temas pri 1987 jaro. La nuna prezidanto de BEA estas Sava Dāl bokov.

Ozon-truo — MINACANTA KATASTROFO

La ozontavolo etendiĝas en alteco de 15 ĝis 50 kilometroj super la tero. Malgraŭ tiu dikeco ĝi estas ege delikata formitaĵo. Se ni sukcesus malsuprentiri ĝin al alteco de la marnivelo, ĝi kunpremiĝus al dikeco de nur 5 milimetroj. Tiel maldensa tie supre estas la aero. La ozontavolo fakte estas maldika, delikata vualo, kiu normale regeneriĝas. En la meza stratosfero la mallongondaj, „malmolaj“ sunradioj trafas al la oksigeno de nia atmosfero. Tiuj oksigenmolekuloj konsistas el du oksigenatomoj, kiuj estas firme kunigitaj (O_2). Se mallongondaj sunradioj trafas al unu el tiuj molekuloj, tiam ili diskrevigas tiujn atomojn. Tia plentrafo forprenas de la sunlumo ĝian detruan energion. Ĝi estas malfortigata kaj filtrata kaj alvenas ĉe ni kiel vivdonacanto. Multaj el la atomoj liberigitaj ĉe tiu procezo, kolektiĝas al plia oksigenmolekulo, al O_3 , la triatoma oksigeno, la ozono. Ankaŭ tiuj molekuloj estas detruataj per la ultraviola radiado kaj reŝangataj al la du-molekula oksigeno. Ankaŭ per tio radioenergio estas foruzata. Tiu konstanta pliigo kaj malpliigo de ozono estas facile difektigema ekvilibro. Por ke ĝi restu en ekvilibro, ambaŭ procezoj devas esti egalaj.

La danĝero: Ozon-mortigilo fluorkloraj hidrokarbonidoj (FKHK)

La fluorkloraj hidrokarbonidoj estas devenantaj de la metano (CH_4), aŭ etano (S_2H_2), kiuj entenas apud karbonatomoj ankaŭ hidrogen-, klor-, fluor- aŭ bromatomojn. Fluorkloraj hidrokarbonidoj estas volatilaj, senodoraj gasoj. Ili estas uzeblaj kun preskaŭ ĉiuj aliaj substancoj; ili ne intermiksiĝas kaj ne kune reagas. En nia atmosfero fluorkloraj hidrokarbonidoj havas vivdaŭron de 100 jaroj. Nur en la stratosfero — tie, kie la ozono havas sian ŝirman efikon — per la ultraviola radiado dum granda malvarmo la en ili entenata kloro estas liberigita. Kaj la kloro fisias poste la triatoman oksigenatomon ozono en la duatoman „normalan“ oksigenatomon.

La sekvo: La ekvilibro en la pliigo kaj malpliigo de ozono estas atakata. La ozono pli rapide malpliĝas ol ĝi pliĝas. La ozontavolo pli maldikiĝas. Ekstrema malvarmo, kiel super la antarkto, favoras tiun procezon. Tial tiu efiko tie unue estas konstatita. Unu FKHK-molekulo povas pereigi ĝis 10 000 ozonmolekulojn. Ĉar la FKHK-molekuloj bezonas 10–20 jarojn por atingi el niaj ŝpruskatoloj la stratosferon, hodiaŭ neniu scias akurate, ĉu eble ne jam estas tro malfrue. Nur post 20 jaroj ni estos pli saĝaj. Sed estus fatale, tiel longe atendi. Tial ni nun devas ekagi!

Produktado kaj konsumado de fluorkloraj hidrokarbonidoj

La tutmonda produktado de FKHK nombras 700 000 ĝis 800 000 tunojn. La problemo de la ozon-malpliigo estis malkovrita jam antaŭ 20 jaroj. Usono, Kanado, Norvegio kaj Svedio jam en 1978 malpermesis la uzadon de FKHK en ŝpruskatoloj. Oni kredis, per tio solvi la problemon. Sed tio estis eraro. Pro la pli grandkvanta uzado en aliaj kampoj, kiel la ŝaŭmigiloj, la konsumado denove atingis la antaŭan altecon.

Por plene kompreni la gravecon de la problemo, ni devas rerigardi 20 jarojn. Jam en septembro 1968

alarmkriis sciencistoj. Ili malkovris truon en la ozontavolo super la antarkto. Ĉu eraro, ĉu mezur-malgustaĵo? Espereble, ĉar la ozontavolo estas la ŝirmilo de nia tero kontraŭ la danĝeraj ultraviolaj radioj el la universo. Pliigo de tiu radiado havus katastrofajn sekvojn por nia vivo.

La esperoj pri mezureraro bedaŭrinde ne pruviĝis. La ozontruo super la antarkto hodiaŭ havas la proksimuman grandecon de la surfaco de Usono. Tio ne estu panikfarado; sed estas fakto, ke la restado ekster domo, ekster ŝirmanta tegmento signifas gravan danĝeron por nia sano. Ankoraŭ ne tute malfermiĝis la ozontruo super niaj kapoj. Sed ni ne trankviliĝu pro tiu fakto. Ni povas kaj devas ŝanĝi la situacion, ĉar ni ja konas la kaŭzon de la ozon-malpliigo. Kiel jam dirite, temas pri grupo da gasoj, nomataj fluorkloraj karbonidoj (FKHK). Tiuj gasoj — ankaŭ tion ni jam menciis — ĉefe estas uzataj kiel premgasoj en ŝpruskatoloj, kiel ŝaŭmigiloj por pakumoj kaj kiel malvarmigiloj en fridujoj.

En konferenco de sciencistoj estis postulita, ke la uzado de fluorkloraj hidrokarbonidoj en ŝpruskatoloj kaj kiel ŝaŭmigiloj estu malpermesataj, ĉar ekzistas nedanĝeraj, alternativaj rimedoj. Se ni volas ŝanĝi la situacion, la konsumantoj nepre devas ŝanĝi siajn kutimojn kaj sintenojn. Ili ekzemple rifuzu la uzadon kaj ne plu aĉetu ŝpruskatolojn kun FKHK-gasoj, kaj ni postulu mondscale leĝojn, kiuj malpermesas la uzadon de fluorkloraj hidrokarbonidoj.

El „La Migranto“
(oficiala ligilo de la esperantistaj naturamikoj,
marto/88)

Penka PAPAZOVA

LIBRO DE LA VIVO

Mi malfermas la Ruĝan Libron

de la vivo

kaj serĉas en ĝi

la Homan Komencon!...

Ĉu mi sukcesos trovi ĝin?

Ĉu la homoj ĝin scipovos gardi?...

Ĉu la Homa Komenco ekzistos

en la estonto,

aŭ restos nur nomenklatura numero?

Mia koro punos la kulpulojn!...



AŬSTRALIO. La grava anglalingva ĵurnalo „International Herald Tribune“ en sia numero de la 25-a de julio 1987 publikigis artikolon pri la Centjara Jubileo de Esperanto, kun intervjuoj kun Tonkin, Auld, Waringhien, Albault k.a.

● Post la fino de la Internacia Jaro de la Paco (I. J. P. 1986) la Prezidanto de Aŭstralia Esperanto Asocio (A.E.A.) sendis raporton al la Departemento pri Eksterlandaj Aferoj pri la agado de la Asocio dum la Jaro, substrekte la rezultojn de enketo ĉe aliaj Landaj Asocioj pri la valoro de Esperanto por la paco, la 25-an Kongreson de A. E. A. en Petro, kiu pritraktis tiun temon, la partoprenon de aŭstraliaj esperantistoj en la Universala Kongreso en Pekino ktp.

En la letero de la Sekretario por la I.J.P. en la Departemento pri Eksteraj Aferoj, de la 25-a de aŭgusto 1987, al la prezidanto de A.E. Asocio S-ro Harry oni legas: „... la subvencio disponigita al A.E.A. estis elpezita laŭ la celoj de la projekto. Ni dankas vin pro via valora kontribuo al la programo de la Internacia Jaro de la Paco en Aŭstralio. ... Ni deziras al vi daŭran sukceson en via programo de agado celanta la antaŭenigon kaj konservadon de pli paca mondo.“

● Dum la 8-a Tutmonda Kongreso de „Aplikata Lingvistiko“, okazinta en Sidnejo (16-21. 8. 87) la organizantoj akceptis referaton de Ralph Harry, prezidanto de A.E.A., pri „La Evolu de Lingvo por Internacia Juro — la sperto de Esperanto“.

CINIO. En la ĉina urbo Siping, provinco Jinin, troviĝas lernejo por blindaj gejunuloj, kie de marto 1987 oni instruas ankaŭ Esperanton. La ĝelernantoj kreis Esperantan ĥoron, kiu jam kvar fojojn prezentigis per la televido. Tamen mankas al ili brailaj Esperanto-libroj kaj aliaj materialoj, kio malfaciligas la lernadon. Kontribuojn danke akceptos s-ro Wei Shun, n-ro 62 Stalin-str., Changchun, provinco Jilin, Ĉinio.

FRANCIO. La 13-an de decembro 1987 en Saint Fons, apud Liono, la urbestro inaŭguris „Skvaron de

l'Esperanto“. Sur la dulingva tabulo oni povas legi: „Tiu ĉi skvaro estis inaŭgurita en 1987 okaze de la centjarigo de la Internacia Lingvo Esperanto, kreita de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Por la amikeco inter la popoloj kaj por la paco inter la nacioj“.

FRG. La 21—23-an de oktobro 1988 Bavara Esperanto-Ligo organizas en Nurenbergo (Nürnberg) feston okaze de la 100-jara datreveno de la unua en la mondo Esperanto-grupo, fondita ĝuste en Nurenbergo. Informas: BEL, Seitzstr. 14 D-8900 Augsburg.

ITALIO. Dank' al la klopodoj de la profesia tradukisto Andrea Gabison, la Itala Asocio de Tradukistoj kaj Interpretistoj agnoskis Esperanton kiel unu el la lingvoj, pri kiuj ĝiaj membroj povas okupiĝi profesie. Interalie tio fiksas normon por salajrata tradukado el aŭ en Esperanto: minimume po 18 000 liroj por unu paĝo, same kiel por naciaj eŭropaj lingvoj.

KANADO. Jam antaŭ la komenco de la Kalgariaj Olimpiaj Ludoj en Kalgario aperis la poŝlibreto „Saluton, amiko/ino“, en 31 nacaj lingvoj plus en la du oficialaj — franca kaj angla, kaj en Esperanto. La ĉefa ĵurnalo de Kalgario „La Kalgaria Heroldo“, publikigis tutpaĝan artikolon pri Esperanto. La merito por tio havas la Kalgaria Esperanto-Komitato en konsisto: Ewart Brown, Dorothy Hawley, Marguerite Wilkinson. (Vidu la foton en „Heroldo de Esperanto“, n-ro 3, 29.2.88, p.1.).

POLLANDO. La pola lernejo-ŝipo „Dar Młodzieży“ navigas ĉirkaŭ la mondo kun 180 lernantoj kaj maristoj. Dum restado en la haveno urbo Santa Cruz (Kanariaj Insuloj), la instruisto Marek Meller (esperantisto) kaj du kunlaborantoj de Pola Televido akceptis sur la ŝipo tri esperantistojn el Tenerifo. Okazis vigla interparolo en Esperanto pri la kvalitoj de la velŝipo, la vidindaĵoj de Tenerifo, la klimato, la arkeologia muzeo ktp. La televida teamo aparte interesiĝis pri tiuj temoj.

SOVET-UNIO. La populara urala monata revuo „Uralskij sledopyt“ (Sverdlovsk, eldonkvanto de pli ol 400 000 ekz.) kunlabore kun la Esperantista Rondo „Kulturo“ jam por la dua fojo organizis konkurson pri esperantigo de ruslingva sciencifika literaturo. En la unua konkursa branĉo, kies objekto estis la rakonto de A. Cumanov „Rozkolora nubo“, premiigis la moskva esperantisto Valentin Melnikov; en la dua branĉo — libere elekta sciencifika novelo — plej bonan tradukon prezentis la Literatura Sekcio de la Sverdlovskia Esperanto-Klubo.

Opinio

NE NUR GRAMOFON-DISKOJ!

Bulgara Esperantista Asocio mendis al la fabriko „Balkanton“ la produktadon de deko da belaj kaj interesaj gramofondiskoj. Sur ili estas registritaj kantoj plenumitaj de la artistoj-kantistoj Veselin Damjanov, Mišo Zdravev, Maria Angelova, Jana Cikalova k.a. Aperis ankaŭ gramofondiskoj de Esperanto-korusoj kaj la dramo „Ni

vivos“ de Georgi Miĥalkov. La Esperantaj gramofondiskoj tre bone helpas la pli bonan lernadon kaj prononcadon de Esperanto fare de la aŭskultantoj.

La aperigo de Esperantaj diskoj devas esti konstanta tasko de BEA, ĉar la esperantistaro bezonas ilin. Paralele kun tiu ĉi agado BEA devas prizorgi la produktadon de

magnetofonaj kasedoj kun kantoj, versaĵoj, fabeloj, skeĉoj, humuraĵoj k.a. De kelkaj jaroj fabriko „Balkanton“ faras, laŭ mendo de klientoj, registradon de kantoj kaj tekstoj sur magnetofona bendo por la merkato. Magnetofonaj kasedoj kun esperantaj certe estos tre bone akceptitaj de la esperantistoj kaj aĉetataj kun piezuro. Ni esperu, ke tiu ĉi propono ne restos „voĉo en dezerto“ kaj oni mendas magnetofonajn kasedojn kun esperantaj por la merkato.

Nikola NIKOLOV

DISTRA VESPERO

La 4-an de marto j. k. en la junpionira Domo E-societo „Georgi Stanev“ — Orjahovo, okazigis sian tradician distran vesperon, dediĉitan al la unua jaro de la dua jarcento de Esperanto. Inter la gastoj estis 10-membra grupo el urbo Kneja kaj grupo el Kozloduj. La solenaĵo komenciĝis per la himno de Esperanto, post kio la prezidantino parolis pri la vivovojo de virinoj-batalantoj por paco kaj feliĉo sur la tero. Estis prezentita belarta programo, kiu plaĉis al ĉiuj. La plenumo de infana danc-grupo sub la gvido de Rumjana Bogdanova kaj Rumen Georgiev kaj la versaĵoj de nia amata E-poetino Penka Papazova same plaĉis al la gastoj.

N. BOSAŠKA



„BAKAGICI — 88“

Laŭ iniciato de Esperanto-societo „M. Gorkij“ — Jambol, la 26-an de marto j. k. okazis Nacia Turista Renkontiĝo „Bakaĝici-88“. Partoprenis 180 esperantistoj el Sofio, Plovdiv, Varna, Ŝumen, Kjustendil, Haskovo, Pazarĝik, Vraca, Samokov, Cirpan, Nova Zagora, Sliven, Gălăbovo, Pravec, Tărgoviște, Loveĉ kaj Jambol.

La unuan tagon por la partoprenantoj estis plenumita riĉa literatura-muzika programo. La E-veterano Stojan Popov recitis la poemon de Zamenhof „La vojo“, sonis ankaŭ la versaĵo „La nokto“ de la E-poetino Penka Papazova. En Esperanto kantis Galja Kostova kaj Maria Dermengieva, oper-kantistinoj el la Ŝtata Muzika Teatro „D. Kărĝiev“ — Jambol., Margarita Ruseva, aktorino el la Ŝtata Dramteatro — Jambol prezentis fablojn kaj epigramojn en Esperanto; kantis junulara grupo „Ruĝa Fajrero“ sub la gvido de Liljana Paraŝkevova. Interesa kaj agrabla estis la programero de la juna esperantisto-iluziisto Veselin Keremegiev.

La vicprezidanto de „Monda Turismo“ Nikola Nikolov parolis pri temo „Esperanto kaj Turismo“.

La partoprenantoj en la Renkontiĝo vizitis historiajn objektojn en la regiono de Bakaĝici.

Iljana ILIEVA

En Sofio:

La dumonata teoria revuo de la Komitato de Kulturo „Problemi na Kulturata“ (kajero 5/1987) aperigis grandan artikolon „Ĉu ni rajtas paroli pri Esperanta kulturo?“ de Atanas Ilkov.

En la lando:

Jurnalo „Ŝumenska Zarja“ — u. Ŝumen (23.11.1988) informas, ke mongola gazeto aperigis la legendon pri bulgara „martenica“, sendita al mongola esperantisto de Ilia Andreev en Esperanta traduko; la sama ĵurnalo (2.11.1988) lokigis informon pri ekspozicio pri Bulgario en v. Koeri, Ukrainia SSR, organizita de la instruisto Genadi Motĉev per materialoj, senditaj de ŝumenaj esperantistoj; la sama (12.11.1988) publikigis informon de Cvjatko Todorov pri aktivado de la esperantistoj en u. Ŝumen lige kun la tradicia „Semajno de la amikeco trans landlimoj“; la sama (8.11.1988) informas pri unuigo de la 4 E-societoj en u. Ŝumen en unu tutkomunuma societo kiu konservas la nomon „Vekiĝo“ kun pli ol 80-jara historio; j. „Narodno Delo“ — u. Varna (2.11.1988) informas pri esperanta kurso en la klubejo de Popola Fronto en la urba kvartalo „Enju Markov“ — u. Ŝumen; Gazeto „Botevski Plamăk“ — u. Botevgrad (27.11.1988) aperigis raportojn kun foto pri sukcesa partopreno de lernanta belarta ensemblo dum la festivalo en u. Bydgoszcz, Pollando; la sama ĵurnalo (19.11.1988) presigis reĉhon de leganto pri tiu raportajo; Gazeto „Kom“ — u. Berkovica (24.11.1988) presigis informon de d-rino Lozana Georgieva pri solenaĵo dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto; Uzina gazeto „Duma na Metalurga“ — Uzino por aluminio en u. Ŝumen (25.11.1988) aperigis informon de Cvjatko Todorov pri traduko kaj dissendo eksterlanden de la legendo pri bulgara „martenica“ de verkisto Veselin Stanilov, fare de la membroj de uzina E-societo „Metalurga“.

NI KONDOLENCAS

La 27-an de marto 1988 en Ŝumen en sia 99-jara aĝo forpasis Jordanka Djukmeĝieva Silvestrieva, unu el la unuaj bulgaraj esperantistinoj, kunfondintino en 1905 de E-societo „Vekiĝo“ kaj edzino de ĝia unua prezidanto Ilija Silvestriev.

Pro ŝia multjara sindona poresperanta agado ŝi estis proklamita honora membro de societo „Vekiĝo“ kaj distingita per la Ora Insigno de BEA.

Forpasis la lasta partoprenantino en la riĉa E-vivo en Ŝumen de la komencaj jaroj de nia movado ĝis nun. Ŝia ekzemplo de sindonemo kaj fideleco al la ideoj de Esperanto estas tre karaj por ni ĉiuj.

* * *

La 7-an de marto 1988 forpasis en Varna Jivka Konstantinova Djulgerova, aktiva membro de Esperanto-societo „Albatroso“ kaj ano de la Klubo de Veteranoj „Mojs Levi“. Ŝi naskiĝis la 11-an de majo 1915 en urbo Elena. Esperanton ŝi eklernis kiel lernantino en la knabina gimnazio en Veliko Tărnovo. Ŝiajn studojn ŝi daŭrigis en la Supera Ekonomika Instituto „Dimităr Blagoev“, kie ŝi konatigis kun sia estonta edzo la esperantisto Georgi Djulgerov. Fininte la instituton, ŝi estis instruisto de librotrenado en la Ekonomika Teknikumo „Georgi Sava Rakovski“ en Varna, kie ŝi instruis ankaŭ Esperanton.

Kiel veterano ŝi estis distingita per la argenta insigno de BEA.

Ni estimplene kliniĝas antaŭ ŝia memoro.



DEZIRAS KORESPONDI

BULGARIO

ALEKSANDRINA BASLEKOVA (17-jara) — Sofio, f. k. Drujba bl. 105, vh. A, et. I — kun ĉi pri muziko, literaturo kaj historio.

STANISLAV STANKOV (19-jara) — 2307 Pernik, Sofio-obl., ul. Petrohan 3 — kun ĉi pri ĉi.

ALBENA STOILOVA (19-jara) — 2440 Zemen, Sofio-obl. ul. Ivajlo 25 — kun ĉi pri ĉi.

VESELINA BANKOVA — Tolbuhin, f. k. Drujba 2, bl. 19, vh. B, ap. 22 — kun ĉi pri muziko, arto kaj poezio. Kolektas BK.

MAJA DOJČINOVA (17-jara, lernantino) — Sofio, f. k. Mladost 2, bl. 225, vh. 2, ap. 28, et. 2 — kun ĉi pri muziko, kino kaj literaturo.

MIRA ILIEVA (7-jara lernantino) — 5500 Loveĉ, bl. 302, vh. V, ap. 22 — kun samaĝuloj el esperantistaj familioj. Kolektas BK, esperantajn porinfanajn librojn.

KONSTANTIN KONSTANTINOV (41-jara, fraŭlo) — 8600 Jambol, ul. Georgi Dimitrov 29, vh. 2 — kun ĉi pri muziko kaj arto.

HISPANIO

Gejunuloj el Katalunio deziras korespondi pri ĉi kun bulgaraj samaĝuloj:

GEMMA FERNANDES i FORNT — Carrer de Baix s/n, E-08786 Villanova d'Espoia.

SILVIA SAUMELL i CASADO — Cal Tiquet, E-08786, Vilanova d'Espoia.

PASQUAL DOMINGO i GUSTEMS — Modesto Domingo, s/n E-08786 Vilanova d'Espoia.

MARTA RIGART i MASIP — Crta, de la Bordeta, 43 atic 1/a E-08014 Barcelona.

POLLANDO

MIECZYSLAW KALURAU (27-jara), patro kaj edzo — Rybnik 44—253, ul. Lompy 17B/3—kun ĉi pri kulturo kaj turismo.

KAPTON KRYSZYNA (22-jara, flegistino) — ul. Krakowska 9 A, 34-410 Rabka — pri turismo, literaturo kaj modo, kun ĉi. Kolektas BK kaj turismaj projektojn.

MAKGORZATA KARDASZ (17-jara, lernantino) — 15-870 Bialystok, ul. Olsztyńska 1/9 — kun ĉi pri moderna muziko, turismo kaj sporto. Kolektas BK kaj revuojn pri modo.

USSR

SVETLANA NOVOSKOLCEVA (43-jara, instruistino de angla lingvo) — 169706 Komi ASSR, Usinsk 1, str. Stroitelej, 3 A. kv. 37 — kun ĉi pri kulturo kaj lingvoj. Kolektas BK.

DIANA ZILIKAITĖ (22-jara) — 234520 Kapsukas, Jaunimo 20-37, Litovio — kun ĉi pri medicino, angla kaj latina lingvoj.

RASINAI BELIUNAITEI (22-jara) — 234520 Kapsukas, str. Z. Angariečio 44-15. Litovio — kun ĉi pri ĉi. LETA MAKAROVAITE — 234580 Alytus, A. Jonuro 9-73, Litovio — kun ĉi pri ĉi.

LJUDMILA KOSTINA (41-jara, edziĝinta, radioteknikisto) — 675006 Blagoveščensk, str. Šimanovskaja 5-86 — kun ĉi pri teatro, muziko, literaturo, naturo kaj turismo.

ENHAVO

- II Kie ni estas? (Radoslav Paraŝkevov)
- 1 UEA 80-jara (Nikola Aleksiev)
- 2 Roman Malinowski al „Bulgara Esperantisto“
- 3 Unua provo pri kunlaboro inter balkanaj esperantistoj (Cvjetko Todorov)
- 4 Kvalifika porinstruista kurso — esperoj kaj konkludoj (Libertaria Mladenova)
- 5 Por nia lingva perfektigo: Denove pri la asimilado de propraj nomoj (Violin Oljanov)
- 6 BET — 30-jara (Belka Beleva)
- 8 Pri la E-propagando: Nikola Aleksiev, Nikola Nikolov, Ljubomir Trifončovski
- 10 Problemoj de la instruado: La metodo de Andreo Cseh (Doc. Georgi Dimov)
- 12 Fortaj radikoj de la vivamo (Atanas Ilkov)
- 12 100 tagojn en Bulgario (Dang Dinh Dam)
- 14 Ozon-truo — minacanta katastrofo
- 15 Tra la mondo
- 16 Enlanda movado
- IV Esperanto kaj Ruĝa Kruco (Maria P. Angelova)

Sur la unua kovrilpaĝo:

Ĉu estonta leganto? Tiun foton sendis al ni la veterana esperantisto el urbo Kotel Bojil Draganĉikov. Pri li legu sur paĝo 12.

Cefredaktoro: Maria JANKOVA

Redakta komitato:

Atanas ILKOV (redaktoro), Venelin MITEV, Dimitar HAĜIEV, Georgi MIHALKOV, Krastju KARUCIN, Kunčo VÁLEV, Libertaria MLADENOVA, Lidia RAEVA (respondeca sekretario), Mariana ELENOVA, Nikola NI-KOLOV, Radoslav PARAŠKEVOV, doc. Stojčo STOJČEV

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado

Eldonkvanto — 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgaria

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

Esperanto kaj Ruĝa kruco

Okaza de la 125-jara datreveno de la fonda de Internacia Ruĝa Kruco

СПУТНИКЪ КРАСНАГО КРЕСТА

на Языкѣ Esperanto

ОГЛАВЛЕНИЕ

- 1—39. I. На перевязочномъ пунктѣ, въ госпиталѣ,
(Самые интересные случаи изъ практики и наблюдения. — Путь отъ изъ-вѣдо до въ явное время или, если возможно, въ путь до конца дѣ-ствія).
- 40—60. II. На перевязочномъ пунктѣ, въ госпиталѣ (продолжение).
- 61—67. III. Донесеніе.
- 68—71. IV. Допросъ.
- 72—77. V. Пасъ. — Возрастъ.
- 78—107. VI. Въ населенномъ пунктѣ.
- 108—127. VII. Въ квартирѣ.
- 128—149. VIII. У торговца.
- 150—173. IX. Въ госпиталѣ.
- 174—185. X. Различные случаи.

Paroli paralele pri tiuj du gravaj noblaj ideoj estas nek vana hazardo, nek elpensajo. Ekzistas profundaj radikoj de veraj ligoj inter Esperanto kaj la Ruĝa Kruco. Tion elokvente pravas la eldiro de Zamenhof mem en la libro „Esperanto kaj Ruĝa Kruco“: „Ruĝa Kruco apartenas al tiuj institucioj, kiuj pli ol ĉio bezonas facilan lernadon de internacia lingvo; vere al aliaj institucioj okazas labori kun homoj, parolantaj diversajn lingvojn, sed nur de tempo al tempo kaj havante eblecon trovi tradukiston. Ruĝa Kruco preskaŭ ĉiam havas laboron kun eksterlandanoj kaj bezonas senprokrastan interkomprenon. Abnegacia laboro de Ruĝa Kruco sur militkampoj ofte perdas ĉiun signifon nur pro tio, ke savanto kaj savito ne komprenas unu la alian.“

Jam en 1906, en la oktobra numero de la Bulteno de Internacia Komitato de Ruĝa Kruco en Genevo oni rekomendis la broŝuron „Esperanto kaj Ruĝa Kruco“ al ĉiuj centraj Komitatoj de Naciaj Asocioj de Ruĝa Kruco en la mondo.

Tiu broŝuro estas meminstruilo de internacia lingvo. Ĝi enhavas gramatikon, ekzercojn, necesajn esprimojn kaj vortaron de leŭtenanto

Bayol, lektoro en la Sen Sira militskolo en Francujo. En 1906 aperis ankaŭ „Interkomprenilo“ por sanitariaj grupoj dum milito.

Tre interesa estas la tiutempe postformate eldonita libreto „Kuniranto de Ruĝa Kruco en Esperanto“. Ĝi prezentas eltiraĵojn el la libro „Esperanto kaj Ruĝa Kruco“, de leŭtenanto Bayol. Sur ĝia kovrilo oni legas „Prenu por militiro“, „Slosilo de Esperanto“ kaj „Kuniranto de Ruĝa Kruco en Esperanto“, kiuj estas dediĉitaj al militvunditoj aŭ malsanuloj, al kuracistoj, hirurgoj, flegistoj, sanitariaj oficistoj, membroj de Ruĝa Kruco kaj diservistoj de ĉiuj konfesioj kaj al ĉiuj, kiuj dum milito povus akcepti aŭ doni helpon. Parizo, Centra esperantista oficejo, 51, Rue de Clichy“

„Kuniranto de Ruĝa Kruco en Esperanto“ ekzistas en 9 lingvoj: angla — Esperanto Guid to the Red Cross; dana — Esperanto vejleder for det Røde — Kors; franca — Guide Esperanto de la Croix-Rouge; germana — Esperanto — Führer für das Rote-Kreuz; hispana — Guía Esperanto de la Cruz-Roja; itala — Guida Esperanto de la Croce-Rossa; rusa — Sputnik Krasnogo Kresta na jazike Esperanto; sveda — Röda Korsets Esperanto-Parlor; portugala — Guia Esperanto da Cruz Vermelha.

La necesaj esprimoj estas aranĝitaj sub 10 titoloj: 1. En ambulanco, en hospitalo; 2. En ambulanco, en hospitalo (daŭrigo); 3. Raporto; 4. Demandaro; 5. Horo. Aĝo.; 6. En domaro; 7. En loĝejo; 8. Ĉe komercisto; 9. En la hotelo, 10. Diversaĵoj.

En la unua kolono oni povas legi tekston en sia lingvo, poste en Esperanto kaj en la tria kolono estas Esperanto-prononcado.

Preskaŭ sur ĉiu paĝo, sube, oni lasis lokon por eldiroj de eminentuloj pri Esperanto kaj Ruĝa Kruco. Tie estas legeblaj pensoj krom de Zamenhof mem ankaŭ de Leo Tolstoj, Paul Blaschke, generalo Baju kaj aliaj generaloj, kuracistoj-akademianoj k.a. La lastajn tri paĝojn oni lasis nur por similaj eldiroj. Tiamaniere „Kuniranto de Ruĝa Kruco“ prezentas ne nur lernilon, sed ankaŭ propagandilon por Esperanto kaj ĝia neceso. Ĝi pravas tre malnovan ligan inter Esperanto kaj Ruĝa Kruco.

Mi dankas sincere al la angla verkistino, akademiano d-ro M. Boulton pro tio ke ŝi elprenis por kelka tempo el sia kolekto de 9 versioj de tiu rara libreto kaj sendis al mi la rusan version.

Marija P. ANGELOVA